


Bulgara Esperantisto

Oktobro 1990



ENHAVO

1. BEA ekiris novan vojon (raporta skipo de «BE»)
- 11 La nova prezidanto de Bulgara Esperanto-Asocio (Maria Jankova)
- 13 Problemoj de bulgara Esperanto-movado (Violin Oljanov)
- 14 10 jarojn Internacia Esperanto-Horo (Sonja Tiĥova, Rumjana Georgieva)
- 16 Agadprogramo de Bulgara Esperanto-Asocio
- 18 Merita jubileo de Botev-recitalo (Belka Beleva)
- 20 Ni recenzas (Georgi Miĥalkov)
- 23 Elstara poeto kaj tradukisto (Hristo Iskrov)
- 25 Scienco
- 26 Esperanto-instruado
- 29 Enlanda movado
- 30 Por nia lingva perfektigo
- 31 Distroj
- 32 Deziras korespondi

Cefredaktoro: Maria JANKOVA

Redaktoroj: Evgeni GEORGIEV kaj Rumjana GEORGIEVA

Redakcia konsilantaro: Dimităr HAGIEV, Krâstju KARUCIN, Kunĉo VÁLEV, Nikola NIKOLOV, Venelin MITEV

Adreso de la redakcio: «Hristo Botev» 97, 1303 Sofio — Bulgario, tel. 22-80-86

Ŝtata presejo «Georgi Dimitrov» — bul. «Lenin» 177, 1113 Sofio

Al la kunlaborantoj: Kontribuaĵojn por la koncerna numero ni akceptas du monatojn antaŭe. La materialoj devas esti koncizaj kaj konkretaj, verkitaj nur en Esperanto, tajpitaj aŭ klare skribitaj. Por publikigo sendu bonkvalitajn fotojn. La Redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn.

Abonkondiĉoj: En Bulgario «Bulgara Esperantisto» estas abonebla per la poŝto, kontraŭ 9.60 lv. Por aliaj landoj — pere de UEA (Kodo-prsp.) aŭ per niaj perantoj, kontraŭ 32 nederlandaj guldenoj aŭ egalvaloro en nacia valuto. La abonprezo por eksterlando en Bulgario estas 21 lv. Prezo de unuopa ekzemplero — 0.80 lv. aŭ 3 ned. gld.

Reklamtarifo

1 paĝo	1/2 paĝo	1/4 paĝo	1/8 paĝo
712 lv.	356 lv.	178 lv.	89 lv.
990 gld	495 gld	247 gld	123 gld

«Bulgara Esperantisto» havas abonantojn en 51 landoj. Represo el «BE» permesata, indiko de la fonto bezonata. Estas organizita regula surbendigo de «Bulgara Esperantisto» por la bezonoj de la blindaj esperantistoj.

Sur la unua kovrilpaĝo: Dum la 42-a Kongreso de BEA, okazinta en Ŝumen de la 29-a de junio ĝis 1-a de julio 1990.

BELGIO

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 ANTWERPEN

BRAZILIO

Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 11-1105, 70084 — BRAZILIA-DF

BRITIO

Paul Hewitt, 26 Highfield Road, North Thoresby, Great Grimsby, SOUTH HUMBERSIDE DN36 5RT

FRANCIO

Fédération Espérantiste du Travail, 115 Rue Béranger, F-92320 CHATILLON

Union Française pour L'Espéranto, 4, Bis, Rue de la Cerisaie, F-75004

PARIS

FRG

Nora Garagea, Poŝtfako 100513, D 6000 FRANKFURT AM MAIN 1

HISPANIO

Jorge Moragues Penella, Pintor Domingo 2-2, 46001 VALENCIA

IRLANDO

Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, DUBLIN 6W

JAPONIO

Yoshiaki Mizuno, Hanazono 1-2418-18, TOKOROZAWA, 359

JUGOSLAVIO

Zoran Murgovski, ul. «Dame Gruev» 65, YU-96000 OHRID

MEKSIKO

Leonora Torrez T., Playa Hornos 575, COL. MARTE, 08830 MÉXICO DF

Enrique Lemus, Insurgentes Sur 3493, Villa Olímpica, Edif. 27-001, 14020 MÉXICO DF

PORTUGALIO

Portugala Esperanto-Asocio, Werther Sacramento, R. Dr. João Couto, 6, r/c.A, P — 1500 LISBOA

SVEDIO

Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, S-24294 HÖRBY

SOVETUNIO

Miĥail Lineckij, P. K. 539/1, SU-252200 KIEVO*

SUD-AFRIKO

C. S. Beckford, P. O. Box. 1227, CAPE TOWN, 8000

SVISLANDO

Esperanto-Perantejo, Weingartstr. 21, CH — 3014 BERN

USONO

Esperanto League For North America, Inc. P. O. Box 1129, EL GERRITO, CA, 95430

La Redakcio serias pliajn perantojn!

Jaro 59

N-ro 10

Bulgara Esperantisto

ORGANO DE BULGARA ESPERANTO-ASOCIO; FONDITA EN 1919

BEA ekiris novan vojon



En periodo de dinamikaj soci-politikaj ŝanĝoj, kaj demokratiigo de ĉiuj sferoj de nia vivo okazis la 42-a Kongreso de Bulgara Esperanto-Asocio. Nehazarde kiel loko de la Kongreso estis elektita Ŝumen — tradicirika urbo en la bulgara E-movado. Jam en 1908 loka E-societo «Vekiĝo» estiĝas iniciatinto kaj gastigas la duan E-kongreson en Bulgario, kiu transformiĝas en grandan kulturan eventon por la ŝumena publiko kaj altiras multajn novajn adeptojn de la Internacia Lingvo. Ĉi tie okazis la scienc-praktika E-konferenco «1300 jarojn Bulgario» en 1981 kaj aliaj landaj laborarangoj. Dum la pasintaj ok jardekoj E-societo «Vekiĝo» disvolvas aktivan sociutilan agadon por disvastigo de Esperanto en Ŝumen kaj ties ĉirkaŭo, starigas utilajn kontaktojn kun E-so-

cietoj kaj kun esperantistoj en multaj landoj, per kio kontribuas por populargado de la bulgara kulturo eksterlande.

La Kongreso, kiun partoprenis 439 delegitoj (pro nekonataj kialoj forestis 144) kaj 180 gastoj, estis solene malfermita la 29-an de junio, k. j. en urba teatro «Vasil Drumev», per mallonga enkondukata parolado de Sava Dâlbokov, prezidanto de BEA. Li emfazis la gravan historian momenton por niĝa lando, en kiu okazas la 42-a Kongreso, kaj notis ties rolon kiel turnopunkton en la plua evoluo de bulgara E-movado.

La unua plenkunsido trapasis sub la gvido de Cano Ignev, vicprezidanto de BEA. Estis ekceptita jena konsisto de la kongresa honora prezidantaro: Sava Dâlbokov, Petâr Todorov, Hristo Gorov, Cano Ignev, Ivajlo Petrov, Nikola Pilev, Petko Arnaudov kaj Valentina Silvestrieva. Per unuminuta silento oni honoris la memoron de la forpasintaj esperantistoj inter ambaŭ kongresoj.

Ivajlo Petrov, prezidanto de Komisiono pri Spirita Evoluigo de Komunuma Popola Konsilantaro — Ŝumen, salutparolis en la nomo de urbestro de Ŝumen kaj bondeziris sukcesan laboron al la delegitoj kaj gastoj de la Kongreso. Sekvis salutparolo de Tibor Papp, estrarano de HEA, el Debrecen (Hungario). Poste Kiril Velkov tralegis saluttelegramon de John Wells, prezidanto de UEA, al la 42-a Kongreso de BEA.



Parto de la kongresanoj

La delegitoj aprobis jenan tagordon de la 42-a Kongreso de BEA:

1. Raporto pri la laboro de Centra Estraro de Bulgara Esperanto-Asocio dum la periodo inter la 41-a kaj 42-a kongresoj kaj pri la antaŭstarantaj taskoj. (raportas S. Dâlbokov, prezidanto de BEA)

2. Raporto de la Centra Kontrola Komisiono de BEA. (raportas Ĥr. Ivanov, prezidanto de CKK)

3. Pridiskuto de la projekto pri nova statuto kaj ĝia akcepto.

4. Elektro de novaj gvidorganoj de BEA.

Estis akceptita ankaŭ regularo de jenaj gvid- kaj helporganoj de la Kongreso: Sekretariato (respondeca sekretario — R. Paraŝkevov), Komisiono pri kontrolo de mandatoj (prezidanto E. Enev), Komisiono pri la agadprogramo (prezidanto L. Trifončovski), Komisiono pri preparo de nova statuto (prezidanto P. Arnaudov), Komisiono pri plendoj (Ĥ. Levi) kaj Komisiono pri elekto de novaj gvidorganoj (prezidanto B. Mladenov).

Sekvis

LA RAPORTO DE CE DE BEA
pri la agado inter la 41-a kaj 42-a kongresoj, voĉlegita de Sava Dâlbokov. Li substrekis, ke la periodo post la 41-a Kongreso karakteriziĝas per aktiva laboro sur ĉiuj agadkampoj. La plenkunsido la 16-an de januaro 1988 markis novajn momentojn en la aktivado de BEA. Estis akceptita programo por renovigo de la Asocio kaj estis kreita nova organiza strukturo — oni fondis kvar komisionojn: instrua, kultura, internacia kaj organiza. Samtempe oni establis financ-mastruman fakon pri financa kaj mastruma agadoj kaj pri konstruado. Bazaj eroj estiĝis la societoj, kiuj nun nombras 180 — po unu en loĝloko, escepte de Sofio kaj Plovdiv, kie estas pli multaj. Post la administra reorganizo de la lando estis enoficigitaj departementaj organizantoj, por ke ili surloke realigu la decidojn de CE. Por plibonigo kaj plivastigo de la kultura laboro oni fondis departementajn E-kulturdomojn. Iuj el ili firmiĝis kaj sukcese ekagadis en la sfero de amatora art-



Sava Dălbokov raportas

aktivado. Sed ĝis nun ties funkcioj ne estis precizigitaj, kio kaŭzis konfliktojn inter ili kaj la koncernaj societoj. En la plenkunsido de CE en decembro 1989 oni elektis tri vicprezidantojn de la Asocio. Ili kune kun la prezidanto kaj ĉefsekretario formis prezidentaron, kiu ekklopodis solvi urĝajn taskojn. Pro la kreskantaj bezonoj, en 1990 estis establita Komisiono pri scienco, dokumentado kaj informado. Krome oni fondis ankaŭ du novajn firmaojn ĉe BEA — «Esperanto-turist» (1989) kaj «Pres-Esperanto» (1990).

La renovigo en BEA de 1988 evidentiĝis maltrafa. Ties ĉefa malperfektaĵo estas, ke ĝi ne superis la troan centrigon kaj burokratan gvidmanieron. Krome, kavankam la diversaj struktureroj kaj aparte la komisionoj havis mandatojn, ili ne posedis la bezonatan organizan memstarecon pri la solvo de problemoj, kaj rezulte de tio multaj akcesoraj demandoj ŝargis la laboron de Buroo de CE de BEA.

Malgraŭ la negativa efiko de la komand-administra sistemo estis ak-

tivado sur ĉiuj agadkampoj — en societoj, kulturdomoj kaj sekcioj laŭ profesioj kaj interesoj. Tamen indas menci, ke granda parto de la aranĝoj estis organizita je relative malalta nivelo, la partoprenantoj estis malmultaj, kaj la kvalito — nekontentiga. Estis nemultaj junularaj manifestiĝoj. Ili estis enuaj kaj ne respondis la interesojn kaj emociojn de la juna generacio. Ne sufiĉis kaj ne altkvalitis la renkontiĝoj laŭ profesioj, ineteresoj kaj sciencaj problemoj. Ĉio ĉi klare montras, ke BEA devas ŝanĝi la stilon kaj metodojn, sed ankaŭ esence ali-formigi la strategion de bulgara E-movado.

Hristo Ivanov raportis

PRI LA AGADO DE CKK,

kiu realigis financajn reviziadojn kaj donis metodikan helpon pri la financaj kaj librotenedaj operacioj al ekonomiaj entreprenejoj de firmao «Globus», kontrolis kaj donis helpon al la agadoj de distriktaj estraroj de BEA, de sekcioj laŭ profesioj kaj interesoj kaj de E-societoj. Pro la konstatitaj malperfektaĵoj kaj preterlasoj la kulpuloj estis punitaj per administraj kaj monaj sankcioj. Krom la reviziado la komisionanoj donis ankaŭ metodikan helpon pri laŭleĝa apliko de la instrukcioj kaj aliaj normigaj dokumentoj pri la ekonomia kaj financa agado. CKK estis engaĝita por la likvidado de la distriktaj estraroj de BEA ekde la 1.01.1988. — inventado de la posedaĵo kaj ĝia transdonado al la lokaj E-societoj. En siaj laborkunsidoj CKK plenumis la kroman taskon trakti diversajn plendojn, disputojn inter individuoj aŭ inter organizaĵoj. Samtiel CKK trastudis vicon da avertoj kaj ligo kun tio ties anoj vizitis distriktajn estrarojn kaj societojn por solvi surloke la ekzistantajn problemojn. Malgraŭ la allasitaj malperfektaĵoj CKK pritaksas pozitiva la fincan kaj ekenomian agadon de la entreprenejoj de firmao «Globus», de la distriktaj estraroj, sekcioj laŭ profesioj kaj interesoj kaj de la E-societoj.

Fine de la unua plenkunsido oni


proponis kaj elektis prezidantojn pri la okazontaj la sekvan tagon kongresaj kunsidoj pri la ĉefaj kampoj de la asocia agado: kunsido pri la instruagado — Nikola Uzunov, kunsido pri la kultura agado — Georgi Miĥalkov, kunsido pri la internacia agado — Petâr Todorov, kunsido pri la scienca kaj informa agado — Cano Ignev, kunsido pri financa-mastruma kaj kontrola agadoj — Stojan Pavunĉev, kunsido pri junularaj problemoj — Dimitâr Dimitrov.

Vespere en la urba teatro «Vasil Drumev» — Ŝumen, por la delegitoj kaj gastoj de la 42-a kongreso de BEA

Bulgara Esperanto-Teatro prezentis komedion «Mi ne plu konas vin» de itala dramverkisto Aldo de Benedetti (reĝisoro Gertruda Lukanova). La agrabla kaj atentokapta intrigo, proponis komediajn situaciojn, kiuj prezentitaj kun takto kaj per bona ludo igis la spektantojn ofte ridi kaj aplaŭdi. Denove sian talenton pruvis geaktoroj Nikolaj Uzunov, Teo Jurukov, Veneta Zjumbjuleva, Belka Beleva, Darinka Goranova, Ivan Zlatarev kaj Angelina Sotirova. La spektaklo estis la unuafoja prezentado de la komedio antaŭ la 75-a Universala Kongreso de Esperanto en Havano, Kubo.

KONGRESAJ KUNSIDOJ

INSTRUAGADO



Multaj el la kongresanoj ekinteresiĝis pri ĝi — eble ĉar ili samopiniis kun Violin Oljanov, ke nur la instruado kaj disvastigado de Esperanto estas ĉefa celo de la E-movado.

Fakte tiu kunsido daŭrigis la laboron de okazinta semajnon pli frue kunveno de E-instruantoj (Sofio, la 23-an de junio).

Komence la sekretario de la Instrukomisiono ĉe BEA Nedka Valjaviĉarska koncize raportis pri ĝia agado inter la 41-a kaj 42-a kongresoj. La raporton sekvis eldiroj. Ne eblas menciigi ĉiujn, ĉirkaŭ dudek personojn, kiuj deziris aldoni, proponi, komenti aŭ kritiki ion. Sed nepre endas menciigi la ĉefajn

temojn, kiujn tuŝis la eldiroj: 1. Bezono de bonaj, modernaj lernolibroj kaj instruhelpiloj; 2. Necesa modernigo de la instruprogramoj; 3. Nesufiĉo de bonaj E-instruantoj; 4. Esperanto en la lernejoj; 5. Ĉu necesas bulgara E-Instituto k.a.

Estis akceptitaj proponoj pri la instruado de Esperanto, kiuj iĝu parto de la Kongresa Rezolucio.

KULTURA AGADO

Malgraŭ ke la kunsidon pri la kultura BEA-agado partoprenis plej multaj delegitoj, proksimume 200, ĝi estis iom konciza kaj streĉita eble pro manko da tempo. La kunsidon gvidis esperantista kulturaganto Georgi Miĥalkov, kiu donis la parolon al dek kvin personoj inter kiuj Nikola Nikolov (Sofio), Petâr Kavalĝiev (Ruse), Dimitâr Haĝiev (Sofio), Bojĉo Mladenov (Vraca), Belka Beleva (Sofio) k.a.

Danĉo Danev el Plovdiv proponis organizadon de ekspozicio de pentristoj-esperantistoj. Laŭ Neli Abaĝieva (Sofio) en la bulgara gazetaro oni malmulte skribas pri la Internacia Lingvo. Donĉo Hitrov — gvidanto de la priesperanta gazetara servo ĉe BEA, informis pri ĝia funkciado kaj proponis okazigon de kurso pri E-ĵurnalistiko en kadre de Bulgara Esperanto-Asocio. Stefka Ĉenkova el Sofio parolis pri la malbona stato de la biblioteko kaj muzeo ĉe BEA.

Nikola Aleksiev — esperantista veterano, faris eldiron pri la eldonado de revuo «Paco».

Maria Jankova respondis al la demandoj rilate al eldonagado de BEA kaj konatigis la ĉeestantojn pri la agado de la nova firmao «Pres-Esperanto».

La multjara aktiva E-kulturaganto Kunĉo Vâlev anoncis la rezultojn de la granda literatura konkurso organizita de la Literatura Sekcio ĉe BEA honore al la 42-a Kongreso.

INTERNACIA AGADO



Pli ol 60 personoj partoprenis la kunsidon pri la internacia agado, gvidatan de inĝ. Petâr Todorov. En la komenco li prezentis la prioritatojn de BEA:

- internacia aktiveco;
- intensaj ligoj de BEA kun UEA kaj ĝiaj fakaj organizaĵoj;
- kontaktoj kun fakaj asocioj;
- forta kunlaborado kun la najbaraj esperantistoj;
- helpo al landoj, kie nun ekestas E-movado;
- pri Esperantaj ligoj kun la bulgaraj kulturaj centroj en diversaj landoj (tiudirekte ĝis nun aktive laboris Dimitâr Haĝiev, Maria P. Angelova (Sofio), Lilia Sotirova (Plovdiv).
- kontaktoj kun neesperantistaj internaciaj organizaĵoj. (Lige kun tio P. Todorov rememoris al la ĉeestantoj la intimajn ligojn inter UEA kaj UNESKO, rezulte de kio aperis du UNESKO-rezolucioj apogantaj Espe-

ranton (Montevideo 1954 kaj Sofio 1985).

Fine Petâr Todorov substrekis la ĝisnunan viglan internacian agadon de bulgara esperantistaro, dank' al kies aktiveco en Varsovio (1987) dum la celebrado de la centjariĝo de Esperanto BEA ricevis la prestiĝan pokalon «Fyne». La parolanto emfazis, ke ni — la bulgaroj mem, ne devas subtaksi la fariton dum la pasintaj jaroj flanke de niaj samideanoj sur la E-kampo.

Poste parolis pliaj dek personoj. Prof. Kiril Popov — vicprezidanto de BEA, skizis la lastatempan internacian agadon de BEA. Li tuŝis ankaŭ la problemojn pri: monhelpo de revuo «Paco» flanke de BEA; internacia E-unueco — scienca, ekologia, kultura, junulara, sporta ktp. La profesoro emfazis la kontribuon de bulgarlingva revuo «Panorama-Esperanto» por la propagando de la Internacia lingvo inter la neesperantistaj enlandaj medioj. Li menciis, i.a. la neceson de starigo de kontaktoj kun Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino, kun Internacia Scienca Akademio Comenius, kun E-Societo ĉe Akademio de Sciencoj en Pekino (Ĉinio), kun E-Centro (Bjalistoko) k.a. Fine li esprimis sian opinion pri Esperanto kiel unu el la neŭtralaj tuthomaj valoraj. La nuntempa ŝanĝiganta mondo bezonas la Internacian Lingvon kaj tial la rolo de esperantistoj estas tre grava kaj respondeca tiurilate.

Dimitâr Haĝiev — multjara diplomato, parolis pri oficialigo de Esperanto en internaciaj organizaĵoj kaj lige kun tio emfazis la kontribuon de revuo «Scienca Mondo». Li tuŝis la problemojn pri lernado de Esperanto en la bulgaraj lernejoj asociiĝintaj al UNESKO, pri modernigo de MEM-agado.

Maria Jankova — direktorino de eldonkomerca firmao «Pres-Esperanto» parolis pri funkciado de bulgara reto de UEA-delegitoj, pri malbona lingva nivelo de bulgaroj, kiuj pere de Esperanto vizitas eksterlandon; pri interŝanĝo de E-grupoj flanke de la esperantistaj societoj (tion multajn jarojn jam faras sufiĉe da societoj, ekzemple en Kubrat, Plovdiv, Velingrad k.a.). La parolintino ankaŭ respondis al demandoj de sinjoroj Ivan Niĉev el Borovo kaj Ŝterjo Kukuŝev el St. Zagora pri interŝanĝo de eksterlandaj E-revuoj kaj pri eldonado de internaciaj E-eldonaĵoj en Bulgario.

Hristo Mandev el Gabrovo parolis pri la

Maria Jankova — Sofio
 Nejko Kunev — Stara Zagora
 Nedka Valjavičarska — Sofio
 Nikola Uzunov — Ĥaskovo
 Petko Arnaudov — Pazarĝik
 Petâr Todorov — Sofio
 Rumjana Janeva — Gabrovo
 Radoslav Paraškevov — Sofio
 Svoboda Damjanova — Kazanlâk
 Stojĉo Stojĉev — Sofio
 Stanka Stefanova — Veliko Târnovo
 Fani Miĥajlova — Plovdiv
 Ĥristo Manolov — Polski Trâmbeŝ
 Hektor Alos — Kjustendil
 Cvetan Lalov — Pleven
 Pavel Elenov — Varna
 Katja Draganova — Ruse
 Dobrinka Zagorova — Ŝumen
 Zdravko Velikov — Pleven
 Janka Ilieva — Karnobat
 Nikola Pilev — Ĥaskovo
 Marijana Dikova — Bjala Slatina

Nikolaj Bojaĝiev — Plovdiv

CENTRA KONTROLA KOMISIONO
 Stojĉo Cankov — Ruse (prezidanto)
 Haim Levi — Sofio (vicprezidanto)
 Pepa Boĵanova — Sviŝtov (sekretario)
 Dimitâr Mutuŝev — Sofio
 Ĥristo Ivanov — Sofio
 Emil Kovaĉev — Vraca
 Sava Stanev — Elena
 Ivan Ivanov — Kubrat
 Angel Nedjalkov — Veliko Târnovo

NOVA PREZIDANTO

Por la posteno de prezidanto de BEA kandidatis **Petâr Todorov**, **Cano Ignev** kaj **Kiril Velkov**. El la balotintaj 323 delegitoj Cano Ignev ricevis 22 voĉojn, Kiril Velkov — 12 kaj **Petâr Todorov** — 289. Do nova prezidanto de BEA oni elektis Petâr Todorov por periodo de du jaroj laŭ la nova statuto de la Asocio.

Unua plenkunsido de la Komitato de BEA

Dum sia unua plenkunsido okazinta la 1-an de julio la Komitato elektis Estraron de BEA, en jena konsisto:

inĝ. Petâr Todorov — prezidanto de BEA,
 Kiril Velkov (Vraca) — vicprezidanto de BEA,
 Venelin Mitev (Sofio) — vicprezidanto de BEA,
 Dimitâr Ĥristov (Jambol),
 Enjo Enev (Burgas),
 Georgi Miĥalkov (Sofio),
 prof. Kiril Popov (Sofio),
 Ljubomir Trifonĉovski (Vraca),
 Svoboda Damjanova (Kazanlâk).

La konsisto de la Estraro estis proponita flanke de la prezidanto de BEA Petâr Todorov kaj la Komitato decidis doni eblecon al la nova asocia gvidanto mem elekti siajn kunlaborantojn. Tial la komitatanoj unuanime voĉdonis por la proponita Estraro.

Dankinte, P. Todorov elstarigis la plej urgajn antaŭstarantajn taskojn: restrukturigo de la Centra Oficejo de BEA kaj preparo de regularo pri laboro de la Komitato kaj Estraro de BEA.

Oni decidis laŭbezone la komitatanoj voĉdoni ankaŭ perpoŝte.

Du komitatanoj estis aprobitaj kiel observantoj en la Estraro; **Mariana Dikova** (Bjala Slatina) — flanke de la junularo, kaj **Maria Jankova** — flanke de la bulgara E-gazetaro.


BELARTA PROGRAMO

La 1-an de julio en la urba teatro estis prezentita riĉa belarta programo, kiun organizis Komisiono pri Kultura Agado ĉe BEA. La programon, kiu daŭris pli ol 5 horojn, anoncis geaktoroj Angelina Sotirova kaj Mišo Zdravev. Sin prezentis pli ol 30 profesiaj artistoj kaj talentaj entuziasmaj amatoroj.

Unua elpaŝis Kamera E-ĥoro el Pazarĝik. Poste poemojn recitis Daniela Ilieva el Targoviŝte, Penka Papazova el Jambol, Angelina Sotirova el Sofio, M. Angelova el Ruse. La publiko ĝuis la profesiajn plenumojn de kantistoj M. Ferdotov, solisto en Muzika Teatro «St. Make-donski» — Sofio, M. Koĵu-ŝarova el Varna, M. Dermengieva el Burgasa Operejo kaj Kr. Cvetanov el Sofio. M. Zdravev plenumis E-kanzonojn, inter kiuj menciindas «Esperanto marŝas», speciale verkita de li okaze de la kongreso. Ankaŭ la knabine-to Sneĵina Jankova kantis du kanzonojn kaj konvinkis la publikon, ke M. Zdravev havas posteulojn.

Sin prezentis folkloraj grupoj el Sliven, Botevgrad, kantgrupoj el Ruse, Jambol k.a.

Ne mankis plenumantoj de humoro — familio Jana kaj Miĥail Ĉobanov prezentis humuraĵojn el Sofio-regiono, aktoro Petko Penĉev el Miĥajlovgrad ne nur ridigis la ĉeestantojn sed ankaŭ plenumis popularan folkloran kanton. La programo finiĝis per plenumoj de Kamera virina E-ĥoro el Gorna Orjaĥovica.



Ne eblas mencii ĉiujn partoprenantojn en la riĉa kultura programo, sed ilia

sinprezento vere estis sukcesa kaj la kongresanoj pasigis la lastajn horojn de la kongreso en bona humoro.

Libroservo

Dum la kongreso firmao «Pres-Esperanto» aranĝis riĉan libroservon. Aĉetebulis ne nur la lastaj bulgaraj eldonaĵoj («Anekdotoj el Gabrovo», «Ŝlosilo de Esperanto» — nova eldono, «Bonvolu, je via dispono» de la konata bulgara aŭtoro Radoj Ralin kun multaj karikaturaj kaj paralela teksto en bulgara lingvo, «Vaŝijat horoskop» — en bulgara lingvo), sed ankaŭ multaj eksterlandaj libroj. La bulgaraj geesperantistoj montris aĉetemon — ĉiu el la ĉeestantoj aĉetis averaĝe kvar librojn, sep kongresajn kovertojn, tri E-markojn, unu insignon kaj almenaŭ unu alian esperantaĵon (sonkasedon, gramofondiskon, afiŝon, bildkarton k.a.)



La kongresa libroservo ĉiam allogis



Pri la kongreso raportis: Maria JANKOVA, Mariana EVLOGIEVA, Rumjana GEORGIEVA, Atanas ILKOV, Evgeni GEORGIEV, Kiril POPOV, Kiril VELKOV
Fotoj: Kirilka SAVOVA, Ĥristo METEV

La nova prezidanto de Bulgara Esperanto-Asocio

PETÂR TODOROV: «Ni estu pli homecaj!»



Li estas 45-jara inĝeniero, esperantistiĝis en 1956. P. Todorov sinsekve okupis la postenojn: prezidanto de E-societo, de Bulgara Esperanto-Junularo, ano de TEJO- kaj STELO-estaroj. Dum ses jaroj li estis membro de la Estraro de UEA. De 1980 ĝis 1987 P. Todorov estis vicprezidanto de BEA. Nun li estas vicedirektoro de firmao «Globus».

Petâr Todorov estas unu el la tradukantoj de la libro «Ŝtelisto de persikoj» de la nuntempa bulgara klasikulo Emilijan Stanev.

Jen la unua intervjuo de Petâr Todorov, kiun li donis al reprezentanto de «Bulgara Esperantisto», tuj post lia elekto kiel prezidanto de Bulgara Esperanto-Asocio.

— Viaj unuaj taskoj?

— Unue, la Estraro de BEA devas trovi novajn pli taŭgajn strukturojn kaj agmanieron de la asocia Centra Oficejo. Ni devas pripensi la nombron de la oficistoj, ilian organizadon kaj gvidadon. Tio reflektos al la financoj, produktiveco, aktiveco kaj servoj. Simple ni serĉos rezultodonan laboron.

Ankaŭ ni devas fiksi la agadplanon de la nova Estraro.

Internaciskale ni devas pli efektive kunlabori kun UEA.

— Kiel devas aspekti laŭ vi Bulgara Esperanto-Asocio?

— BEA havas sufiĉe gravan kaj bonan aŭtoritaton kaj ni devas strebi plifirmigi ĝin. Pli altan kvaliton en nia laboro ni povas atingi per plibonigo de la meza lingvonivelo de la bulgaraj esperantistoj, ĉar ni ĉiam estas kritikataj pro manko de kutimo paroli Esperanton.

Due, oni devas plibonigi la rilaton inter BEA kaj neesperantistaj institucioj. Ni pli bone montru la E-kulturon al neesperantistaj medioj.

BEA devas certigi al siaj membroj pli da kontentigaj servoj: vojaĝoj, libroj ktp.

— Kian helpon vi bezonas...

— La membraro de BEA devas esti pli kompakta por solvi la diversajn problemojn, ĉar, se estas unueco — ĉiam estas pli da sukcesoj.

Ni devas strebi ne al tiom multaj E-manifestiĝoj kiel ĝis nun, sed ili estu altnivelaj, bone preparitaj kaj memorindaj.

Ni estu pli ĝentilaj kaj homecaj en la nomo de la ideo de la esperantismo. La nova demokratia situacio en Bulgario donas al ni eblecon por pli profunda kaj sendependa laboro.

Maria JANKOVA

NOVAJ HONORAJ MEMBROJ DE BEA

Ivan Keremidčiev — Sofio
 Marin Petkov — Sofio
 Nikola Mladenov — Sofio
 Stojan Kostadinov — Sofio
 Eftim Ančev — Kjustendil
 Rajna Kasabova — Ŝumen
 Todor Paŝtrapanski — Vraca
 Petâr Lilkov — Sofio
 Toma Ajolov — Plovdiv
 Georgi Simeonov — Vidin
 Dimitâr Simeonov — Sofio
 Ilija Ilijčev — Sevlievo
 Ivan Georgiev Srednogorski — Sevlievo

Miĥail Karamiĥajlov — Sofio
 Todor Ŝoŝev — Sofio
 Georgi Markov — Blagoevgrad
 Dimitrina Tončeva — Blagoevgrad
 Kalju Bjandov — Burgas
 Ĥristo Cvetkov — Varna
 Ĥristo Dolčinkov — Veliko Târnovo
 Ĥristo Manolov — Polski Trâmbeŝ
 Miĥail Dančev — Plovdiv
 Stojan Tanev — Pazarĝik
 Manol Ĉolev — Velingrad
 Georgi Idakiev — Haskovo
 Dimo Martinov — Kazanlâk (v. Krân)



Scenoj el la okazinta premiero de komedio «Mi ne plu konas vin» de Aldo de Benedetti, prezentita de Bulgara Esperanto-Teatro dum la 42-a Kongreso de BEA.



PROBLEMOJ DE BULGARA ESPERANTO-MOVADO

(Marĝenaj notoj dum la 42-a Kongreso)

1. ESPERANTO VENKIS EN... BEA



Estas konata la okazo (jam 53 jarojn la esperantistoj memoras ĝin!), kiam en 1937 dum la kongreso de BEA en Pazarĝik, en iun el la kongreskunsidoj eniris civila sendito de la regantoj, flustris ion ĉe la orelo de la prezidanto, kiu anoncis laŭtvoĉe, ke la debatoj pludaŭros en la bulgara lingvo. Tio efikis ŝoke al la kongreso, ĉar ekzistis firma tradicio en ĉiuj E-aranĝoj utiligi nur Esperanton. Sekvis ŝtormo de indigno, kiun la prezidgvidanto apenaŭ sukcesis trankviligi. Post la kongreso «Bulgara Esperantisto» publikigis proteston de CK de BEA al la Ministerio de la Enlandaj Aferoj kun postulo pri sankcioj kontraŭ la kulpulojn.

Ĉu vi konas, karaj legantoj, similan precedenton de publika protesto dum la reglamentado de la asociaĝado far la CK de Bulgara

Komunista Partio? Kaj ja la rajton de E-uzado oni regule subpremis. Niaj «gvidantoj» bonvole kaj serveme trudis la bulgarlingvan diskutadon, eĉ se inter centoj da esperantistoj ĉeestus nur unu observanto el niaj ideaj edukistoj. Kaj ja tiaj observantoj regule ĉeestadis por antaŭgardi de devioj de la «rekta» (komprenu: partia) vojo.

Tiel estis forgesita la komenca tradicio, kiu karakterizis nian specifon, kaj kiu nin distingis disde aliaj kulturorganizaĵoj. Ĝi samtempe kontribuis praktike por plialtigo de la lingva nivelo de la esperantistoj kaj kontribuis ankaŭ por disvolviĝo de la lingvo, ĉar ĝi disvolviĝas en la konstanta, ĉiutaga praktiko.

Eĉ en la 42-a estis farita provp devojigi la kongreson de la esperantilingvaj debatoj, sed la kongresanaro, por

nia ĝojo, ne allogiĝis al tiu tento.

La unua plenkunsido de la novelektita Komitato okazis same nur en Esperanto (kio ne okazis plurajn antaŭajn jardekojn). Ĉiuj ĝiaj 45 membroj estas bonaj esperantistoj kaj la diskutado en Esperanto ne prezentis malfacilaĵojn.

Fervoraj propagandistoj de la komunista partio konstante enkapigadis al ni, ke la partio helpas al ni morale kaj materiale. Tio neniun povis konvinki, eble nur iujn malnovajn kaj maljunajn partianojn kaj kelkajn ne tiel maljunajn partiajn burokratojn, absorbintajn ĝis la medolo de la ostoj ĝian dogmismon kaj fanatismen. Jes, la partio, kiu senkontrole mastris la ŝtatan trezorejon, donis ankaŭ al BEA, kiel al duonido, donis al la metitaj de ĝi siaj konfidatoj samtiel eblecon senkontrole malŝpari la rimedojn elprenatajn de la sen tio mizera ekzistado de la bulgaraj impostdonantoj.

Morale? Jes, ni estis gvidataj fakte de duonkleraj, duonsaĝaj memfidaj instruktoroj, trudantaj al ni la gvidantajn kadrojn (ofte ne esperantistojn), kiuj instruis nin kiel fari plenkunsidojn, kiam kaj kiel organizi kongresojn, iliaj «zorgoj» atingis tiajn detalojn — kiel ornami la kongresajn halojn, kiel kaj kie en la urbo meti propagandaĵojn, kiel devas efektiviĝi la debatoj, al kiu doni la parolon... En iu

kongreso ili faris grandan problemon, ke la kongresaranĝantoj volis meti la portretojn de Todor Ĵivkov kaj Zamenhof en unu nivelo (kia ofendo kontraŭ la majesteco de la duonklara pravecano!). Kiom da fojoj estis proponata por la centra estraro la plej aktiva en Kazanlâk esperantistino Svoboda Damjanova! La aparatoj kaj la nomenklaturuloj ĉiam senapelacirajte ŝin malprobis. Oni ne permesis al la esperantistoj elekti ŝin eĉ prezidanto de la loka societo! Kaj la partia kampanjo kontraŭ la estraron en Jambol kaj la provo de la komunuma partia komitato trudi neesperantistojn, el kiuj kelkaj eĉ ne estis aŭdintaj pri Esperanto! Anstataŭe la idealisma esperantisto, sekretario de la eksa distrikta estraro de BEA Dimitâr Hristov, estis mistraktita.

Niaj partiaj instruktoroj ŝanĝiĝadis, sed la kvalito de iliaj indikoj ĉiam restis la sama. En ĉiuj okazoj ilia celo ne estis la progreso de la E-movado.

En la dua duono de la 50-

aj jaroj nin regis la nedistingiganta per abunda menso D. P., dum la 60-aj — la psike malekvilibra E. J., en la 70-aj — la ambicia duonklara, kun dubinda moralo kaj etiko G. D. ktp. Ĉiuj iliaj indikoj similis unu al alia kiel pluvgutoj, ĉiuj distingiĝis per dogmismo, sklavado al rigida ideologio, manko de racio, manko de ĝusta rigardo al la sociaj postuloj de la tempo. La ĉefaĵo estis servi al la partio (komprenu: al la partia gvidantaro), propagandi en eksterlando ĝian politikon, inkluzive eĉ de la ŝovinisma ondo dum 1984-89, kiu abrupte kontraŭstaris al la internaciismaj ideoj de la E-movado. Kiom da raportoj de la mistrafinta partia gvidanto estis tradukitaj en Esperanton kaj disvastigataj senpage! Kiom da rimedoj, kiom da valora papero misuzita!

Netakseblaj estas la moralaj malgajnoj de la bulgara Esperanto-movado en la periodo 1956—1989 pro la maldelikata interveno de la partia burokrataro, administra-komanda rilato al

la kadroj kaj la tuteca agado de la movado. Ni havas ankaŭ niajn viktimojn.

Ĉio ĉi fatale reflektis al la lingva evoluo de la esperantistoj, kiu ne enestis en la programo de la partia nomenklature kaj ties plenumantoj en nia movado.

Tiurilate la 42-a kongreso (unua libera post pluraj jardekoj) faris abruptan ĝiron. En ĝi oni ne nur parolis, en Esperanto, sed firme kontraŭstaris la provon transiri al la bulgara. Kaj fine ĝi elektis novan gvidantaron el veraj esperantistoj, kapablaj ekkonduki la movadon al nova vojo surbaze de la malnova tradicio surtretita de la totalismo.

Esperante je senbremsa progreso de la Bulgara Esperanto-Asocio ni, ĉiuj fidelaj esperantistoj, unuigu niajn klopodojn por helpi la Komitaton en ĝia nobla misio!

Violin OLJANOV
(Sekvas)

* Todor Ĵivkov estas naskita en vilaĝo Pravec.

10 jarojn Internacia Esperanto-Ĥoro

Antaŭ 10 jarojn en Stokholmo dum 65-a UK de UEA bulgara ĥorestro Dimitâr Terziev altiris kantemulojn el diversaj landoj por partopreni en la kongresa programo. Tiamaniere estis fondita Internacia Esperanto-Ĥoro. Poste la geĥoranoj kolektiĝis sinsekve dum la UK en Antverpeno (1982), Budapeŝto (1983), Augsburg (1985), Roterdamo (1988), Braĵtono (1989). Ĉiam la manifestiĝoj de la ĥoro ĉarmis la publikon per sia belsoneco kaj arta precizeco.

La 10-jaran jubileon de la ĥoro oni festis en Bulgario de la 20-a ĝis la 30-a de junio 1990. Kelkajn monatojn antaŭ tio la sekre-

tariino de la ĥoro Lili Dokova multe laboris por la organizo de la Jubileo.

La 20-an de junio en IEK-Pisanica kolektiĝis 27 geĥoranoj el 12 landoj — Germanio, Anglio, Aŭstrio, Belgio, Israelo, Pollando, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Francio, Italio, Sovetunio kaj Bulgario por prepari sian repertuaron. Partoprenis ankaŭ E-ĥoro el Litovio — urbo Paneveĵis, E-ĥoroj el Pazarĝik, Stara Zagora, Gorna Orjaĥovica, Sofio kaj 35 individuaj geĥoranoj el Bulgario. La etoso estis sincera kaj amika. La pitoreska naturo influis al la bona humoro. Tage ĉiuj geĥoranoj provkantis por

la jubilea koncerto kaj vespere koncertis diversaj ĥoroj kaj grupoj.

Unua sin prezentis la grupo el Murmansk, kiu ludis popolajn instrumentojn kaj kantis en Esperanto kaj en la bulgara. Ĉia programo estis vera plezuro por la ĉeestantoj. La gvidanto de la orkestro estas V. Alejnikova kaj la animulo de la grupo, ĉiam kantanta kaj ludanta — Aleksandras Masjukas.

Por ĉiuj kantis ankaŭ la E-ĥoro el Lito-

Dum la dua parto de la koncerto kantis Virina kantgrupo el St. Zagora, Virina koruso el G. Orjaĥovica, E-ĥoro de la instruistinoj el Pazarĝik. El Sovetunio sin prezentis instrumenta grupo el Murmansk, kantistino Aleksandra Verĥova, Miksa ĥoro el Litovio. Sekvis plenumoj de trio «Sirings», operkantistino Valentina Ŝunelska el Varna Operejo, Emilija Andonova kaj Sofia E-Ĥoro. Poste ĉiuj partoprenantoj — entute 163, plenumis «Jubilean festkanton por Esperanto», «Ekflugu nia Esperanto-kant'».



vio. La ĥorestrino E. Grumbiniene emocie gvidis la kantadon kaj samtempe solkantis. La E-ĥoro el Stara Zagora salutis la litovojn per litova popolkanto. Ankaŭ la E-ĥoro el Pazarĝik prezentis sian programon. Estis plezuro aŭskulti la koncerton de trio «Sirings»: fluto — M. Sergieva, hobojo kaj kantado — T. Kostova kaj fagoto — L. Mânzova. Ĝia programo estis tre riĉa, kun E-klarigoj. Poste kantis la Sofia E-ĥoro.

La 24-an de junio ni ĉiuj forveturis al urbo Ĉepelare, kies loĝantoj estis feliĉaj aŭskulti la koncerton de diverslandaj geĥoranoj.

La 26-an de junio en kinejo «Osvoboŝdenie» en Sofio okazis la jubilea koncerto de la Internacia E-Ĥoro. Sub la gvido de sia ĥorestro D. Terziev oni plenumis «Bonvenon» — teksto kaj muziko I. Szábo kaj L. Zsoldos, «Paca kanto» — laŭ germana melodio, la oratorion «Signo de l'esper'» de Hendel en akompano de trio «Sirings», la anglan kanton «Bonan nokton» kaj havajan kanton «Disiĝo»-n.

Tre emociita, la ĥorestro D. Terziev dankis al ĉiuj geĥoranoj, kiuj venis el diversaj partoj de la mondo por festi la jubileon. Li menciis en kronologia vico la manifestiĝojn de la ĥoro de 1980 ĝis nun kaj samtempe prezentis al la publiko la aktivajn kantojn. Al ĉiuj oni donacis florojn.

Fine de la koncerto eksonis «Himno de ĝojo» el Naŭa Simfonio de L. van Beethoven. La riĉa belarta programo anoncata de A. Sotirova kaj M. Manolova ĝuigis ĉiujn ĉeestantojn.

La festo okaze de la 10-jara jubileo de la Internacia E-Ĥoro estis evento por la bulgara esperantistaro, ĉar nur dum UK oni povas ĝui la artsukcesojn de tiu kantokolektivo. Kontentaj estis ankaŭ la fremdlandaj geĥoranoj, plejmulto el kiuj por la unua fojo vizitis Bulgarion. Ili estis ravitaj de la belega naturo de Rodopi-montaro, ĝoiigitaj pro novaj renkontiĝoj kaj konatiĝoj.

Al novaj artsukcesoj, jubileuloj!

Sonja TIHOVA
Rumjana GEORGIEVA

Al plena renovigo de BEA!

AGADPROGRAMO

DE LA 42-A KONGRESO DE BEA

La bulgara esperantista movado eniras sian duan jarcenton en etoso de grandegaj eventoj. Dum la pasintaj cent jaroj nia movado estis firme ligita kun la streboj de la bulgara popolo al internacia interkompreniĝo, libero kaj demokratio. La esperantistoj estis veraj heroldoj de la vivofero kaj frateco inter la popoloj. Kelkaj generacioj — adeptoj de la Zamenhofaj ideoj — konstruis la internacian aŭtoritaton de BEA.

La dinamikaj ŝanĝoj en la mondo kaj la radikala renovigo en Bulgario kreas ne nur kondiĉojn, sed ili postulas nepre, ke ni faru fundamentajn ŝanĝojn en la bulgara esperantista movado kaj BEA.

Elirante el ĉio ĉi kaj konsiderante, ke

— inter la du kongresoj estas plenumita granda laboro kiel de la Centra estraro, tiel ankaŭ de la societoj, la sekcioj, la Domoj de Esperanto-kulturo k.a., sed samtempe pluraj E-aranĝoj estis ne bone organizitaj:

— multaj membroj de la Asocio malbone posedas Esperanton;

— ne sufiĉas fakaj aranĝoj — pri profesioj, hobiaj, sciencoj, k.a. por popularigi nian agadon;

— nia agado deflankiĝas de la novaj cirkonstancoj kaj taskoj de la nuna Esperanto-movado, kiuj devigas nin ne nur ŝanĝi la stilon kaj la metodojn de nia agado, sed ankaŭ serioze kaj profunde pripensi la strategion de la bulgara Esperanto-movado.

La 42-a kongreso de BEA difinas la sekvajn gvidliniojn en la strategio de nia movado dum la antaŭstaranta periodo:

Unue — edukado de la membroj kaj amikoj de Esperanto je konvinko kaj fideleco al la idealoj de esperantismo kaj laboro por ties disvastigo en nia lando.

Due — plimultigo de la homoj, kiuj ne nur lernas, sed ankaŭ bonege parolas Esperanton.

Trie — praktika uzado de Esperanto por kontentigo de la interesoj, profesioj, turistaj kaj aliaj bezonoj en la vivo de la esperantistoj.

Por atingi de tiuj celoj, la Kongreso opinias, ke la Komitato kaj la Estraro de BEA devas direkti siajn fortojn al praktika realigo de la jenaj taskoj:

I. En la instrua agado

1. Organizo de altnivela lernado de Esperanto pere de aktualigitaj instruprogramoj, diversaj formoj kaj rezultodonaj nuntempaj metodoj.

Specialan atenton postulas la instruado de Esperanto en la lernejoj, surbaze de aktivigo de la rilatoj kun la Ministerio de Klerigo.

2. Altigo de la kriterioj rilate la E-instruistojn. Oni aranĝu por ili sisteman kvalifikadon kaj periodan ekzameniĝon.

3. Kreo de diferencigitaj instruprogramoj, lernolibroj, vortaroj, helpiloj pri metodiko, ekzamenoj k.a., kies grava celo estu praktika regado de la Lingvo Internacia.

4. Vasta kaj plena utiligo de la eblecoj de IEK-Pisanica por pli profunda studado de Esperanto.

5. Laŭplana organizado de sciencaj esploroj pri aktualaj problemoj de la instruado.

II. En la scienc- kaj eldonagado:

1. Laŭplana prilaboro kaj esploro de temoj kaj problemoj en esperantologio, interlingvistiko, historio de E-movado. Profunda esploro de la ideo pri Scienca Instituto.

Komenco de laboro por kreo de scienca historio de bulgara Esperanto-movado surbaze de E-informado kaj dokumentado laŭ la modernaj postuloj, kolektado de rememoroj de veteranoj-esperantistoj.

2. Propagando kaj disvastigo de Esperanto en la sciencistaj medioj, adapto de nia movado al la nacia kaj monda scienco kaj tekniko.

3. Organizado je alta scienca nivelo de prelegoj, konferencoj, seminarioj, simpozioj, disputoj ktp.

Plibonigo kaj plialtigo de la intereso eksterlande al la tradicia Internacia Somera Esperanto-Universitato en Veliko Târnovo, riĉigo de ĝia programo per kulturartaj aranĝoj.

4. Krei kaj eldoni sciencajn verkojn pri la bulgara E-movado, bulgaran enciklopedieton «Esperanto», tradukadi en Esperanton bulgarajn sciencajn librojn kaj disvastigi ilin en nia lando kaj eksterlande.

5. Uzi modernajn sciencajn rimedojn — sociologiajn enketojn, komputilojn ktp.

6. Organizi la abonadon de BEA kaj de ĝiaj membroj por eldonaĵoj de UEA, SAT kaj aliaj gravaj eldonaĵoj en Esperanto.

7. «PRES-ESPERANTO» laboradu per perspektivaj programoj kaj evoluigu la eldonagadon.

La Komitato de BEA preparolu la enhavon kaj la grafikan aranĝon de «Bulgara Esperantisto» kaj «Panorama-Esperanto» kaj akceptu konforman decidon pri ilia plua plibonigo.

III. En la kultura kaj arta agado

1. Rapida reglamentigo de la organizado kaj funkciado de la E-kulturdomoj. Ili estu unuigantaj centroj de kulturlaboro por multaj societoj kaj kluboj.

La Centra E-kulturdomo funkcii kiel centro de la kultura vivo en Sofio kaj metodika helpanto al la kultura aktivado en la tuta lando.

2. Radikale plibonigi la kulturan kaj artan laboron kun la centra kaj loka gazetaro kaj kun aliaj organizaĵoj.

3. Entrepreni novajn paŝojn por esperantigo kaj evoluigo de la bulgara nacia kulturo kaj ties popularigo eksterlande.

4. Kreado de pli da originalaj verkoj, libroj, literaturaj kaj kantkolektoj, okazigo de kulturaj disputoj, seminarioj ktp.

Akcelo de laboro por altiro de pliaj artkreatoj al nia movado.

5. Organizi en la kultura sfero ne multenombrajn, sed altkvalitajn aranĝojn kun bona lingva nivelo kaj perfekta belarta majstrecio.

6. Reglamentigi Bulgaran Esperanto-Teatron kaj Sofian E-Horon kiel relative memstarajn kaj kun propraj statutoj naciajn E-kulturajn instituciojn, kiuj aktivadas en kaj eksterlande por esperantistoj kaj neesperantistoj.

IV. En la internacia kaj turista agadoj.

1. Detale informiĝi pri la agado de la ceteraj naciaj asocioj, interŝanĝi sperton kun ili, ricevadi pli multe da revuoj, bultenoj, aktivigi iniciatojn kun UEA kaj aliaj E-asocioj.

2. Uzi la novajn kondiĉojn en nia lando por plivastigi la individuajn kontaktojn de bulgaraj esperantistoj kun eksterlando per vigla korespondado kaj reciproka gastigado.

3. Firmao «Esperanto-turist» organizu pli da kolektivaj, regionaj kaj individuaj ekskursoj de esperantistoj en eksterlando. Samtempe plibonigi la bazon kaj kondiĉojn por akcepto de fremdaj turistoj, la kulturon de ties priservado. «Esperanto-turist» starigu firmajn kontaktojn kun alilandaj turistaj organizoj. Surbaze de kontraktoj starigi seriozan kunlaboradon inter «Esperanto-turist» kaj diversaj fakoj ĉe la Estraro de BEA.

V. En la financa kaj mastruma agado

1. Efektivigo de bona financa politiko, bazita sur raciaj elspezoj. La liberan kapitalon oni investu al profitodonaj entreprenoj.

La estraroj de la firmaoj «Globus», «Esperanto-turist», «Pres-Esperanto», «Majak» kaj IEK-Pisanica periode raportu en la Komitato de BEA pri ekonomiaj rezultoj de sia agado.

2. Plirapidigi la finkonstruadon kaj ekipadon de la Domo de BEA en Sofio.

3. Fari perspektivan programon por solvi la problemon pri la materia bazo por normala agado de la societoj kaj aliaj organizaĵoj.

4. Plivastigi la reton de ekonomiaj entreprenoj ĉe societoj, kluboj k.a. por ampleksigi iliajn financajn eblecojn por la E-laboro.

5. Ĉe la Estraro estu fondita Konsilio de specialistoj pri financaj kaj ekonomiaj problemoj.

6. Modernigi la teknikan bazon de la asociaj oficejoj kaj presejoj por certigi pli altan kvaliton de ties agado.

7. Plibonigi la ordon pri la donacitaj kaj la akiritaj de la Asocio havaĵoj. Oni instigu la esperantistojn donaci al la Asocio valorajn librojn, bibliotekojn de veteranoj, muzeajn eksponaĵojn.

8. Starigi kunlaboron kun la Bulgara Esperantista Kooperativo.

Merita jubileo de Botev-recitalo

La konkurso — deka laŭvice — estis proklamita «jubilea». La organizantoj havas rajton: dum dek jaroj ili sukcesis subteni la aŭtoritaton de Botev-recitalo en Esperanto en sia urbo; ilia organiza sperto riĉiĝis; la kvalito de la proponitaj plenumoj — ĉu parolaj, ĉu kantaj — plialtiĝas.

Ĉi-jare la publiko ĝuis la teneran voĉeton de la sesjara Erma Angelova el Vraca en plenumo de kanto el Bulgara Renesanco. La publiko estimis la saĝan eseon «Botev kaj ni», plenumitan de ĝia aŭtoro — 79-jara Asen Linov el Letnica.

Kaj en la aĝa intervalo de tiuj du plenumantoj sinsekvis dek ok partoprenantoj, kiuj meritis siajn premiojn.

Luj el la individuaj kaj kolektivaj plenumantoj aperis jam plurfoje ĉe similaj konkursoj kaj ilia progreso estas rimarkebla. Bone!

Aliaj kunportis la neatenditan agrablan surprizon de novaj partoprenantoj. Ekzemple:

— kvin knabinoj, proksimume dekjaraj, el E-societo «Georgi Stanev» — Orjaĥovo, en maristaj kostumoj, kun voĉetoj klaraj, E-prononcado korekta, okuletoj brilaj, kun kredo, kun koncentrigita atento, kun influo elvokis niajn larmojn, niajn aplaŭdojn pro admiro, pro ĝojo! Dankon, infanoj! Brave al via instruistino! Vi estiĝu fervoraj esperantistoj!

— sin prezentis koruso «Esperanto» el E-societo «Ĥristo Botev» — Kozloduj, per plenumo «a cappella» de tri kantoj — precize, pure, ĝuste. Dankon!

Pri kio la plenumantoj atentis plue?

1. Pri pli preciza prononcado de lingvo Esperanto: a) klaraj vokaloj (Sofio, ekkrio, urbo, k. a.); b) pli facila H (heroo, havas); c) oni devas gardi la sonorecon de konsonantoj, kiuj laŭ bulgara prononcado perdas ĝin (Sed — ne set, pluvmantelo — ne plufmantelo, land' pereos — ne lant' k. a.). Pro tio oni devas unue komenci per la lingvo — ne lerni parkere sen kompreno.

2. Maksimuma prilaboro rilate la enhavon de la poemo, de ĝia ena ideo, de la sinsekvaj bildoj — ne nur laŭ strofoj. Oni eldiru la tekston ne kantante, tamen gardante la ritmon de la verso, prezenti klare la aŭtoran penson. Ĉiu kreanto havas sian propran stilon.

3. Por atingi veran, emocian, modernan interpreton de literatura verko, ni ne ŝajnigu porokazan mienon, gestojn — ili naskiĝas dank' al la natura emocia vivo de la plenumanto.

Gratulojn okaze de viaj premioj, gesamideanoj!

Dankon pro via didligenteco prezenti al ni la poemojn de Ĥristo Botev — bulgara genio, bulgara fiero!

Belka BELEVA

PREMIOJ

1. Premioj aljuĝataj laŭ statuto.

1. Granda premio ne aljuĝita.

2. Unua premio kun laŭreata titolo — al **Rumjana Bogdanova** el Orjaĥovo kaj al **Conka Stojanova** el Sofio.

3. Dua premio — al **Angelina Gjurova** el Plovdiv

kaj al **Ekaterina Stajkova** el Ĉepelare.

4. Tria premio — al **Ginka Torĉeva** el Plovdiv, al **Liljana Georgieva** el Ajtos kaj al **Ivalina Mateeva** el Miĥajlovgrad.

5. Kolektiva premio kun laŭreata titolo — al grupo ĉe E-societo «**Georgi Stanev**» — Orjaĥovo.

6. Kuraĝiga premio — al **Julia Kirova** el Elin Pelin.

Ĉiuj premiitoj laŭ statuto ricevas diplomojn kaj monpremiojn.

II. Premioj de sociaj organizaĵoj.

1. Premio de CE de BEA — al **Asen Linov** el Letnica, al **Bojĉo Mladenov** el Vraca, al **Erma Angelova** el Vraca.

2. Premioj de E-Societo «Sukceso» (Vraca) — al koruso «Esperanto» ĉe E-societo «Ĥristo Botev» — Kozloduj, al Infana koruso ĉe lernejo «Ivan Nivjanin» — Vraca, al grupo «Nuanco» ĉe E-societo «Maksim Gorkij» — Jambol, al grupo ĉe E-societo «Diĉo Petrov» — Ĉepelare, al grupo ĉe E-societo «Espero». — Blagoevgrad.

3. Premio de la redakcio de «Bulgara Esperantisto»: jarabono por 1991 — al Borjana Ivanova el Letnica, al Dobrina Miševa el Letnica, al Ralica Ruseva

el Sofio kaj al Radost Ĥristova el Sofio.

Ĉiuj premiitoj de CE de BEA kaj de E-societo «Sukceso» — Vraca, ricevas diplomojn kaj monpremiojn.

JURIO: Belka Beleva — prezidanto

Emilia Andonova, Kiril Velkov, Stojan Pavunĉev, Ljubomir Trifonĉovski — membroj

Festivalo kaj konferenco en Budapeŝto



Inter la 4-a kaj 9-a de julio la hungara ĉefurbo Budapeŝto gastigis la Festivalon de Internacia Kulturo kaj paralele — Konferencon pri la celo kaj strategio de E-movado. Ĝi allogis proksimume 150 partoprenantojn el 12 landoj.

La estrarano de UEA pri kulturo Spomenka Štimec malfermis la aranĝojn, kaj d-ro Vilmos Benczik, novelektita prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio, prelegis pri la movado kaj diktaturoj. Pri Esperanto kiel pontolingvo de paco parolis Linhart Ryznar.

Tre interesaj estis la prelegoj enkadre de la Konferenco pri la celo kaj strategio de Esperanto-movado. L. Ma. Hernandez Yzal rakontis pri la agado de la laborrondo «Takács», kaj d-ro Giorgio Silfer — pri la rolo de raŭmismo en la nuntempa E-agado. D-ro Árpád Rátkai esprimis sian opinion pri la eventoj en la orienteŭropa E-movado, kaj Géza Kurucz — pri la kunlaborado de la Esperantaj organizaĵoj en Mez-Eŭropo. Imré Szábó prelegis pri la rolo de Esperanto-gazetaro, kaj János Petik — pri la aplikado de la Internacia Lingvo en la turismo. Konkludajn prelegojn pri la lanĉita temo fa-

ris Oszkár Princz, estrarano de UEA, Jerzy Leyk kaj Géza Felső.

La programeroj de la Festivalo de Internacia Kulturo ne abundis, sed sufiĉis por ĝui la atingojn en Esperanto: filmaj kaj pupteatraj prezentoj, koncertoj kaj ekskursoj al vidindaĵoj en Budapeŝto kaj Szentendre, amikaj renkontiĝoj dum kafpaŭzoj... D-ro Árpád Máthé prezentis riĉegan ekspozicion, prezentantan la historion de E-periodaĵoj, kaj Judit Fülör Kádárné, ano de la Eduka Subkomisiono de la Hungara UNESKO-Komitato, kaj Spomenka Štimec inaŭguris ekspozicion «Mia unua legolibro».

Similaj kunigitaj aranĝoj tre utilas por la E-movado. Oni devas nur bedaŭri, ke bulgaroj mankis ne nur inter la prelegantoj, sed ankaŭ en la kulturprogrameroj. Ni povus vidi kaj ĉerpi pozitivan sperton.

Ljubomir TRIFONĈOVSKI



DU JUVELAJ ANTOLOGIOJ

«Moderna bosnia-hercegovina novelo». Antologio. Kompilis: Ĝemaludin Alić. Respondeca redaktoro: Fetah Zvirac. Eld.: Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, Sarajevo. 1989. p. 178.

«39 modernaj poetoj». Antologio de la postmilita bosnia-hercegovina poezio. Kompilis: Ivan Kordić. Esperantigis: Ladislav Režek. Respondeca redaktoro: Fetah Zvirac. Eld.: Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino. Sarajevo. 1985. p. 110.

Antaŭnelonge mi ricevis du belegajn librojn: antologion de la moderna bosnia-hercegovina novelo kaj antologion de la postmilita bosnia-hercegovina poezio, kiu enhavas la poemojn de 39 poetoj.

La antologio de la moderna bosnia-hercegovina novelo enhavas novelojn de 25 verkistoj. La unua impresado estas, ke la kompilito deziris ne nur prezenti la plej elstarajn novelistojn, sed montri la historian evoluon de la bosnia-hercegovina novelarto. Legante la novelojn mi nesentebles enpenetris en la multjarcentan historion de Bosnio kaj Hercegovino. Antaŭ miaj okuloj kvazaŭ pasas periodoj ligitaj al la Romia Imperio, al la slavoj, al la turka invado, al la Aŭstra-Hungara Imperio, kaj iom post iom mi pli bone ekkonis la popolon, kiu loĝis kaj loĝas en tiu ĉi angulo de la Balkana Duoninsulo, kie renkontiĝis la kulturaj tradicioj de multaj popoloj kaj gentoj. Eble tial la noveloj estas tiel allogaj, tiel riĉaj je ideoj, asocioj, pensoj kaj sentoj, sed pli gravas la fakto, ke la talentaj bosniaj-hercegovinaj verkistoj strebis, sur la vasta kaj riĉa historia fono, pentri ne la eventojn kaj la okazintaĵojn, sed la homojn. Ili deziris profunde enrigardi en la homajn animojn kaj krei realajn vivajn figurojn kun iliaj ĝojoj kaj doloroj, revoj kaj esperoj. Impresas ekzemple la pasia flama amo de Mitar el la novelo «Sur la rivero» de Svetozar Ĉorović, la reliefa figuro de la forta, kuraĝa, sed senlime soleca Mustafa Maĝar el la novelo «Mustafa Maĝar» de la nobelpremiito Ivo Andrić aŭ la ege homece kaj varme priskribita portreto de la bonkora Alija Ĝeveni-

ca el la novelo «La fidelulo Alija Ĝevenica» de Erih Koš.

Ne eblas menciigi ĉiujn aŭtorojn kaj analizi ĉiujn novelojn, kiuj kune formas la bildon de la riĉa moderna bosnia-hercegovina novelo. Kiam mi finlegis la libron, en mi restis la agrabla sento, ke mi faris longan vojaĝon al nekonata lando kaj mi renkontiĝis kun interesaj, neordinaraj homoj, dank' al kiuj mi iĝis pli riĉa kaj pli feliĉa.

La Esperanta traduko de la noveloj estas altnivela kaj tion certigas la elita teamo de jugoslaviaj E-tradukistoj, inter kiuj estas la bone konataj nomoj de Tibor Sekelj, Josip Veletić, Boriša Miličević kaj aliaj.

Tre gravas la fakto, ke la antologio enhavas la kompetentan enkondukon de Ĝemaludin Alić kaj detalajn notojn pri la aŭtoroj kaj tradukintoj, kiu ege helpas la Esperantajn legantojn en ilia pli bona orientiĝo pri la nuntempa bosnia-hercegovina literaturo.


La poemaro «39 modernaj poetoj», malgaru ke aperis antaŭ kvar jaroj, bone kompletigas la panoramon de la bosnia kaj hercegovina literaturo. Tiu ĉi antologio havas la saman taskon kiel la antologio de la moderna bosnia-hercegovina novelo. Ĝi celas malfermi alian fenestron — fenestron al la poezio de tiu ĉi literaturo kaj por tiu ĉi celo la kompilito Ivan Kordić elektis 39 poetojn, kies poemoj bone montras la longan kaj malfacilan vojon tra kiu pasis la moderna bosnia-hercegovina poezio. Tiuj ĉi belegaj kaj trafe elektitaj poemoj prezentas diversajn literaturajn skolojn, tendencojn kaj influojn, kiel ekspresionismon, neosimbolismon, superrealis-

mon kaj la plej modajn tendencojn en la monda poezio. La motivoj, la ideoj de la poemoj estas tre vastaj, tre variaj. En pluraj poemoj reliefigas la bildoj kaj la impresoj de la terura milito, kiel ekzemple en la kreado de Mak Dizdar, aliaj ravas nin pro sia intima, lirika atmosfero kiel ekzemple la poemoj de Vladimir Nastić kaj en aliaj elstaras la filozofiaj meditoj pri la eternaj problemoj de la vivo kiel ekzemple en la poemoj de Stefan Tontiĉ.

«39 modernaj poetoj» montras 39 diversajn poeziajn mondojn kaj ĉiu leganto povas trovi inter ili la poeton, kiu staras plej proksime al liaj sentoj, pensoj, al lia mondkoncepto kaj laŭ mi tio estas la plej grava. La poemaro enhavas antaŭparolon, kiu tamen dediĉas pli da atento al la historio de Bosnio kaj Hercegovino kaj nur kelkajn frazojn al la evoluo de la bosnia kaj hercegovina poezio. Por mi pli bone estus, se Ivan Kordić, kiu estas verkisto, iom pli detale priskribus la ĉefajn evolutendencojn de la poezio. La antologio same enhavas biografiajn notojn pri la poetoj, kiuj estas tre utilaj, tamen laŭ mi ne estas la plej trafa, ke sola tradukisto tradukis ĉiujn poemojn. Ĉu li vere sukcesis enprofundi en la 39 poeziajn mondojn kaj samnivele interpreti ilin en Esperanton?

La du antologioj impresas ne nur enhave, sed ankaŭ forme. Ili estas kompetente redaktitaj de Fetah Zvirac, modele presitaj sur altkvalita papero kaj kompeneble la kolegoj el Bosnio kaj Hercegovino devas fieri pro tiuj ĉi du valoraj kontribuoj al la traduka Esperanta literaturo.

Georgi MIHALKOV



Grafikaĵo: Penka PETKOVA

Ivan KORDIČ

DOMO SUB LA ĈIELO

*La dom' sub ĉielo
Aŭ superĉiele,
Endome silento
Araneo angule.*

*Pri kio temas
Kaj kio vin nun sieĝas?
Ĉu batas la kor'
En jako malnova?*

*Nuda soleco de l'muroj kaj de l'teg-
mento
Kiel herbejo, arbar' aŭ rivero.
Ĉu nenio almenaŭ ektuŝas vin de-
nove
Kaj ankoraŭfoje tie ĉi atendas?*

*Harmonio ne estas arto
Ĝis subĉielo kreskanta.
Nek morta patrino,
Nek fratoj maljunaj.*

*Ne plu estas harmonio,
Nek domaj hirundoj,
Nek malvarma akvo,
El putoj mallumaj.*

*Nek fonto ie
kaŝita en herbo,
Nek levkoj' pasia
Ĉi tie ĉe la muro.*

*Harmonio restis nur
En via kapo,
Kvazaŭ frenezo,
song' aŭ fantomo*



90 jaroj depost
la naskiĝo de N.
V. Nekrasov (1900)

ELSTARA POETO KAJ TRADUKISTO

Nikolaj Nekrasov naskiĝis en Moskvo dum frosta decembra tago — 18.12.1900. Li ricevis bonan hejman edukon. En moskva lernejo elmontris sin kiel naturdotita knabo. Li havis inklinon al la literaturo, profunde legis verkojn de Puŝkin kaj Lermontov, de Blok kaj Belij—famaj rusaj poetoj.

Li intencis fariĝi rusa verkisto, sed Esperanto rabis por ĉiam lian atenton, fariĝis senco en lia vivo. Li lernis la Internacian Lingvon en 1915, kiam furiozis la Unua Mondmilito. Pri tiu evento li versis:

**«Vi, Esperanto, estas mia prismo,
tra kiu vidas mi el mia ĉel'...»**

La semoj, ĵetitaj de la unuaj esperantistoj sur la rusa grundo, ĝermis malgraŭ la trijara civila milito. Ĉe grandaj ekonomiaj mankoj kaj ruinoj, en 1918-19 sur soveta teritorio reviviĝis pli ol 100 E-grupoj. Dum tiu periodo Nikolaj estis elektita kaj funkciis kiel prezidanto de Tutruslanda ligo de junaj esperantistoj kaj redaktoro de «Juna Mondo». Li mem kompostis la revueton.

En 1922 li estas kunfondinto de revuo «La Nova Epoko» kaj ĝia kunredaktoro ĝis 1930. La revuo unuigis ĉirkaŭ si kelkajn bonajn kaj talentajn verkistojn, kiuj sukcesis koncentriĝi kaj esprimi ĉion esencan kaj ĉion ĉefan, kion havis tiutempe la revolucia movado esperantista sur la kampo de ideologio kaj literaturo. Kiel redaktoro Nekrasov speciale okupiĝis pri historio kaj kritiko de E-literaturo, ideologio de la proleta revolucia E-movado, nacia problemoj kaj mondaj lingvoj (kosmoglotiko). La Unua kongreso de Sovetrespublikara Esperantista Unuiĝo (SEU), okazinta en 1923 en Moskvo, elektis lin membro de CK de SEU kaj lingva komitatano.

Nekrasov estas unu el al fonditoj de Internacia Asocio de Revoluciaj E-verkistoj. Laŭ rekomendo de komisiono, konsistanta el G. Germanetto (italo), J. Matejka (hungaro) kaj G. Bakalov (bulgaro) IAREV estis estigita oficiale kiel sekcio de Internacia Unuiĝo de Revoluciaj Verkistoj. Ĝia prezidanto estis elektita Ludwig Renn, fama germana verkisto.

En 1934 li redaktis la organon de IAREV «La Nova Etapo», kies programo celis kreskigi la revolucion literaturan kaj kulturon.

Nekrasov multe tradukis. Simile al la fruaj esperantistoj, kiuj tradukis famajn aŭtorojn, li sekvis ilian ekzemplon. Unue li aktivis sur kampo de literaturo tradukenda. Lia granda merito estas la romano en versoj «Eŭgeno Onegin» de Puŝkin, aperinta en 1931. Li mem komentariis la romanon. Pola poeto Leo Belmont, tradukinta «Onegin» en polan lingvon, salutis Nekrasov per jenaj versoj:

**«Tradukon brile faris vi.
Al vi transdonas laŭrojn mi.»**

Per tiu ĉi traduko Nekrasov pruvis sian eksterordinaran versfaran talenton. Artismo estas rimarkinda trajto de Nikolaj. Jen pluraj tradukoj: «Kupra rajdanto» de Puŝkin; «Dekdu» kaj «Najtingala ĝardeno» de Blok; «Blanka cigno» de Belmont; «Mona Liza» de Gerasimov; «Mortaj ŝipoj», «Nubo en pantalone» kaj «Suno» de Majakovskij; «Socialismo» de Bezimenskij k. a.

Li versis ankaŭ originale en Esperanto: «Krono de sonetoj pri Esperanto»; «Fablo pri la gilotinŝraŭbeto», «Testamento de satano»; «Verda flamo»; «Letero al Leo Belmont» k.a.

En siaj originalaj poeziaj verkoj li devenas de la rusaj poetoj simbolistoj, ĉefe Brjusov. Lia modelo — verki simple kaj klare — estis Zamenhof, Mejer, Grabovski, Devjatnin.

En 1926 li publikigis vojaĝimpresojn «Tra USSR per Esperanto».

Nekrasov laboris ankaŭ sur la kampo de la literatur-scienco. Lia ĉefa atento estis direktita al la literaturaj herooj kaj al la aŭtoroj. Li prijuĝis ilin el klasa vidpunkto. Kiel literaturesploristo li subtenis ĉion novan kaj progreseman en la originala literaturkreado.

Li verkis kritikajn studojn pri E-verkistoj Julio Baghy, Hindrik Bulthuis, Teo Jung, N. Hohlov, E. Miĥalski, G. Deŝkin, St. Schulhof k.a.

En sia funkcio kiel redaktoro de «La Nova Epoko» kaj «La Nova Etapo» Nekrasov subtenis la junajn bulgarajn verkistojn M. Ljubin (A. Grigorov) kaj H. M. Hrima. (Ĥr. Gorov), el klasa vidpunkto recenzis novelojn «La himno» de Ljubin kaj «Ĉe abismo» de Hrima, «La ruĝa aŭroro» de Ljubin li nomas «brava poemareto», kies lingvo estas riĉa, komprenebla kaj plastika. Li konkludis,

ke la tri verkoj estas abunda rikolto sur la proleta kampo.

Ofte pro manko de loko en la gazetaro la vera funda kritiko ne povis esti kulturata en kontentiga amplekso, kaj tiam Nekrasov alpaŝis al konciza recenzado. Tiamaniere il recenzis «Tra la ventego» de Ĥristo Smirnovski, «Ĉe posteno» de Georgi Karaslavov kaj «Septembro» de Geo Milev.

La brila periodo de la sovetia Espertantomovado finiĝis en 1938 per la stalinaj persekutoj. Nekrasov estis inter la unuaj viktimoj de la kulto. Laŭ biografia skizo en «Esperanta antologio», p. 857 Nikolaj Nekrasov mortis en la Dua Mondmilito. Preciza dato ne estas indikita. Certe neniu scias kiam forpasis tiu ĉi belega homo, fidela esperantisto, vera rusa homo kun filozofiaj konceptoj kaj artisma animo.

En la nuna epoko de rekonstruo kaj publikeco SEU reviviĝis simile al la legenda fenikso.

Ni firme kredas, ke la nova generacio daŭrigos la sanktan aferon de la veteranoj sovetaj.

Ĥristo ISKROV

Utila kaj necesa helpilo

Aperis la Jarlibro por 1990 de Universala Esperanto-Asocio (UEA). Ĝi enhavas 399 paĝojn. Sur ili la leganto povas trovi ĉiujn plej gravajn kaj necesajn sciigojn pri UEA — celoj, taskoj, kaj agado. Oni liveras informon ankaŭ pri ĉiuj internaciaj fakaj kaj laŭ intereso E-organizaĵoj kaj pri gravaj movadaj institucioj.

Grava parto de la jarlibro estas la aperigo de la delegitata reto. Tiu unika en la mondo servo konsistas el 2278 personoj, loĝantaj en 71 lan-

doj. Ili senpage, memvole transprenis la taskon servi al la movado kaj ĝiaj anoj. En Bulgario la delegitan reton konsistigas 56 personoj, kiuj plenumas jenajn honorajn oficojn: delegitoj — 16, vicdelegitoj — 2, junuldelegitoj — 1 kaj fakdelegitoj — 52. Sume — 71. Ili loĝas en 21 loĝlokoj, precipe urboj.

Salutinda estas la iniciato aperigadi mapojn de la landoj, kie funkcias reprezentantoj de la delegitata reto. En la jarlibro estas reklamo de hoteloj, restoracioj, banlokoj kaj komercaj aŭ industriaj firmaoj. En la bulgara parto

denove aperis tutpaĝa ilustrita reklamo pri nia tre populara Internacia Esperanto-Kursejo.

Multaj bulgaroj dezirus esti membroj de UEA, ricevadi ĝian organon «Esperanto» kaj la jarlibron. Granda baro tamen estas, ke la membrokotizo devas esti pagata per okcidenta konvertebla valuto. Bulgara Esperanto-Asocio strebas solvi tiun problemon. Verŝajne la pli racia kaj aktiva eldonado de E-literaturaĵoj en Bulgario ankaŭ povus helpi tiurilate.

Nikola NIKOLOV

«MAGNITOTRON»

Ĉu la magnetaj akvo kaj nutraĵo estas: «sorĉaĵo»?

La eksperimenta konstruista buroo «Magnitotron» — memstara laborgrupo ĉe la firmao «Neftohim» en bulgara urbo Burgas okupiĝas pri aktivado, ankoraŭ nerekonita de la scienco — problemoj de la permagneta prilaborado de akvaj sistemoj, materialoj kaj biologiaj objektoj.

La komenco de tiu ĉi okupo datumas ekde la jaro 1952, kiam la ĉefo de la buroo Nikola Stanĉev, laborante en la kemia fabriko en u. Dimitrovgrad, konstatis, ke tie, kie elfluadis el la fabriko la ruba akvo prilaborita per magnetaj kampoj, uzataj por malkomponado de la solidaj sedimentoj, la vegetaĵaro komencis rapide disvolviĝi. Tiu ĉi fenomeno forte impresis lin kaj la ceterajn specialistojn. Ilia komenca intereso baldaŭ transformiĝis en esploristan pasion kaj ili komencis serĉi la kaŭzon. Ĉiuj iliaj eksperimentoj estis direktitaj al esplorado de la kemia konsisto de la akvo, ĝis kiam foje ili ne tralegis en iu fremdlanda revuo pri la eksterordinaraj ecoj, kiujn akiras diversaj substancoj, pasintaj tra la magneta kampo. Ili faris la respektivan analogion kaj la konkludo venis laŭ si mem. Ekde tiam, jam preskaŭ 30 jarojn la problemo pri la permagneta prilaboro de la substancoj, estas fokuso de la scienc-esplora aktivado de Stanĉev. Tiel rezultis ankaŭ la fondo antaŭ kvar jaroj de la buroo «Magnitotron». En ĝi oni okupiĝas pri scienc-esplora aktivado kaj konstruado de malmultekostaj kaj, plej grave, ekologie nemalutilaj ilaroj por magnetigo de akvo kaj aliaj substancoj. La celo estas la plialtigo de ilia aktiveco. En sia laboro la buroo kalkulas ankaŭ je la naturaj fizikaj kampoj, kiujn posedas kelkaj koloraj (neferaj) metaloj kiel la aluminio kaj la kupro. La uzataj de la buroo sistemoj estas kompare simplaj. Ili estas konstantaj magnetoj — metalaj tuboj kun kradformaj apartigiloj. La akvo trapasas de la minusa al la plusa poluso. Sed la rezultoj estas frapantaj. Sur la proksimume 4,5 mil hektaroj la semiĵaj kampoj, irigaciitaj per magnetigi-

ta akvo, la rikolto pligrandiĝis per 30%, krome ĉe 30% malpliigo de la mineralaj aldonoj, de nitratoj kaj nitritoj. Per ĉ. 27% estas reduktita ankaŭ la akvo por irigacio. Imponaj estas la rezultoj ankaŭ en la bestobreda farmo en u. Bâlgarovo. La bovidoj, bredataj per magnetigitaj nutraĵo kaj akvo, donas pligrandiĝon 23% pli altan ol la normala. La eksperimentoj, faritaj en la Instituto pri veterinara medicino en u. Veliko Târnovo, pravas, ke ĉe la permagneta prilaboro la aktiveco de la enzimo LIZOCIM (natura bestdevena antibiotiko) pliiĝas per 40%. Tiuj ĉi faktoj ankoraŭ ŝajnas nekredeblaj kaj estas neklarigeblaj fare de la normigita scienco, tamen lastatempe ili altiris la atenton de aferistoj el Kalifornio kaj Arizono en Unoso. Laŭ ties invito du bulgaraj specialistoj el «Magnitotron» (Ivan Milev kaj Nikola Stanĉev) pasigis en Usono pli ol du monatojn kaj tie, el lokaj materialoj ili konstruis kaj muntis magnetajn irigaciajn ilarojn. Jam la dekan tagon post la muntado la kaliforniaj farmistoj konstatis, ke la tritiko, kiu estis irigaciita laŭ la nova bulgara teknologio, videble disvolviĝas pli bone ol la cetera. Ĝi estis pli alta kaj pli sukabunda.

Ambaŭ bulgaraj specialistoj faris ankaŭ alian eksperimenton. Sur kelkaj aŭtomobiloj estis muntitaj sistemoj por magnetigo de brulaĵo. Similaj eksperimentoj estis faritaj ankaŭ antaŭe en Bulgario. Jam tiam oni konstatis, ke la konsumo de brulaĵo ĉe aŭtomobiloj, provizitaj de magnetaj sistemoj, reduktiĝas per 20—25%. La precizaj esploroj en Kalifornio tamen atestis ankoraŭ pri io — la emisioj de la forbrulintaj malutilaj gasoj reduktiĝis per pliaj 40%.

Kaj ne malfruiĝis la propono. Ĝi venis de la firmao Am-ex-International. Ĝi koncernas la kreon de eksperimenta bazo por la apliko de la permagnetaj teknologioj en la sfero de la irigacio kaj bestbredado samkiel malfermon de bulgara teknika reprezentejo en San-Francisko. Laborgrupo el 15 usonaj specialistoj — reprezentantoj de grandaj konsorcioj kaj firmaoj, ekzamenis la atingi-

tajn de Milev kaj Stanĉev rezultojn kaj venis al la konkludo, ke decas doni al la bulgaroj eblecon daŭrigi siajn eksperimentojn sub realaj kondiĉoj en Usono. Por la celo unu el la grandaj farmoj en la ŝtato Arizono proponis, ke la 10 000 bovidoj bredataj tie estu nutrataj per magnetigita nutraĵo. Se la eksperimentoj donos pozitivajn rezultojn, la usonaj aferistoj devontigas sin plivastigi la eksperimentojn. Konforme al la investitaj rimedoj al la bulgara flanko estos elpagita ankaŭ parto de la profito.

Antaŭnelonge tiucele Bulgara Eksterkomerca Banko asignis 30 000 valutajn levojn. La probableco pri kunlaboro ampleksas ne nur la kamparan ekonomion. La usonanoj manifestis deziron pri kunlaboro ankaŭ en la celuloza-papera industrio, en la kemia industrio, la bioteknologioj kaj la maŝinkonstruado. La kompanio Am-ex-International pretas tuj komenci la kunlaboron. Ankaŭ de la bulgara flanko estas preteco. Kia estos la fina rezulto, tion montras la estonteco.

Esperantigis: Dimităr HAĜIEV

ESPERANTO-INSTRUADO

Por revizio de bulgaraj instruiloj



Partoprenonta kiel instruanto en intensa E-kurso en Vârșec (en januaro 1990), mi mirplene trarigardis la lernan materialon por bulgaroj. Ĝi tute ne kontentigis min kaj tiel mi uzis (por dua grado) proprajn tekstojn kaj ekzercaron kaj iom tralaboritan gramatikon de K. Velkov. La legaĵojn, tre ŝatatajn de la partoprenintoj, mi prenis el diversaj lernolibroj kaj revuoj.

Pro la invito skribe prezenti miajn ideojn pri tio, ĉi-sube mi skizas tiun krudan labormaterialon.

Mi esperas, ke neniuj atendos de mi entute konkretajn proponojn. Certe mi kunla-

boras en la verkado de lernolibroj por katalunoj, sed ja temas pri unu homo inter sufiĉe da aliaj pedagogie pli kapablaj. Aliflanke, mi jam du jarojn loĝas en Bulgario kaj mi ne sufiĉe regas la bulgaran por elabori lernolibron por bulgaroj. Ankoraŭ mi havas preskaŭ nenian alian sperton, krom en E-kurso en Vârșec. Tamen mi akceptas diri mian senpartian pozicion (perfekta vorto ĉi tie por tekstaĉoj, kiaj la cetere febla traduko de la Dimitrova parolado en Leipcig) kaj tuj donos liberan vojon al spertaj bonaj instruistoj kaj metodikistoj, kiuj bonvolos preni sur sin tiun pezan laboron.

Tre necesas, ke eksterlandano trarigardu la tekstojn, por ke ili malhavu naciajn konstruojn. En la lernolibraj tekstoj de Esperanto svarmas tiaj eraraj aŭ malfacile tolereblaj esprimoj: «por eksenti sin pli-malpli enirinta en la lingvon epserantisto...», «en Bulgario ne estas altegaj montaroj, kiaj la Himalaoj, la Alpoj...», «Nia lando estas ankaŭ malgranda kiel Bulgario», «rivero Danubo lavas la ebenaĵojn», «mi preferas naĝi en Nigra maro ol en Balatona lago», «tio koncernas min, Togleron, Popov-on kaj Tanev-on». Rimarku cetere, ke krom la lasta, ĉiuj ekzemploj estas elprenitaj dum rapida trakontrolo de la dek unuaj paĝoj de «Ni lernu plu!».

Por prepari tian lernolibron gravas ĉu en Bulgario oni jam serioze listigis la interfe-

rajn diferencojn inter la bulgara kaj Esperanto. Temas ĉefe pri: falsaj amikoj, diferencoj ĉe la transitiveco de la verboj, ĉe la uzado de artikoloj, verbo-tempoj kaj modoj (ĉu la bulgaroj eraras volitive? — la katalunoj senĉese faras tion, ankaŭ mi; ĉu ili ne tro uzas malsimplajn tensojn? Ili ja ege emas al pasivaj formoj anstataŭ uzi «oni». Mi ne scias ĉu iel la bulgaraj verbo-aspektoj interferas esperanten, uzigas aliajn tensojn aŭ modojn ktp./k.a.

Tiu ĉi teoria bazo estas ege grava por nia laboro, mi dirus eĉ entute necesa por atingi seriozan moderne planitan lernolibron. Certe parto de tiu laboro estas jam bone farita de Violin Oljanov, kaj aperas en liaj lernolibroj. Sed ĉu ne estas pli?

Mi scivolos ankaŭ pri la celgrupoj de la kursoj. Laŭ mi aŭdis, estas sufiĉe da lernejoj en la lando, kie oni instruas la lingvon. Mi foje demandas min ĉu tiuj lernejoj havas specialajn lernolibrojn, aŭ ĉu Oljanov iel provis per tiuj lernolibroj verki lernilojn por la infanoj. Ĉiuokaze, se lerneje oni uzus tiun materialon, estus terura fuŝo, ĉar ili tute ne taŭgas por tio.

Oni devas unue decidi ĉu plu instrui lerneje. Se la decido estas jesa, tuj ekkrei eblecojn, por ke tiuj infanoj ne forfuĝu de la movado, kiam ilia instruisto ekturnas la dorson. Inter tiuj eblecoj, la plej facila kaj unu el la plej necesaj estas la verkado de taŭga lernolibro, kie krom lerni Esperanton, la infanoj plifortigu la konojn pri sia nacia lingvo (aŭ ĉiuokaze pri la bulgara) kaj eble ankaŭ pri la rusa aŭ germana kazo-sistemo.

Mi ne estas fakulo pri tiu temo, sed estas literaturo kaj spertoj pri tio. Mi mem legis la bonegan «Metodikon de Esperanto» de Szerdahelyi, kie li instruas ne tiom la estontajn instruistojn, kiom la futurajn metodikistojn, la verkistojn de instrulibro. Ankaŭ tiu temo interese estas tuŝita.

Alia afero estas la instrusistemo. Ĉu la lernolibro estas por memlernantoj, korespondaj lernantoj, regulaj lernantoj kun instruistoj, rapidaj kelktagaj kursoj, k.a. Ĉio ĉi devas entute klariĝi dekomence.

Fakte ju pli mi rigardas tiujn lernolibrojn,

des pli mi miras. Mi prezentos laŭorde miajn kritikojn kaj proponojn. Mi fakte parolas nur pri la lernolibroj de dua kaj tria grado por bulgaroj.

UNUE, la vortoj estas sufiĉe senzorge elektitaj. Ni lasu la absurdajn gramatikajn vortojn, per kiuj oni nur ventplenigas la kapon de la lernantoj (**vokalo, konsonanto, genro, substantivo, adjektivo, verbo, afikso, pronomo** — nur en la unua leciono!). Rigardu la duan lecionon ekz.: **truto, konifera, jugo** apud la gramatikajoj **komuna nomo, majusklo, minusklo, krampo**.

DUE, la tekstoj estas tre povraj. Entute mankas literaturaĵoj. Eĉ en la tria grado troviĝas nur du literaturaj tekstoj, entute taŭgaj cetere: «Solomono kaj la oaza nimfo», kaj parto de la Zemenhofa parolado en Buloŝjo. Sed, kiel Auld devizas en «Paŝoj al plena posedo», «Esperanton oni plej bone lernas per studado de bona Esperanto». Por la dua grado ekzistas multaj bonaj tekstoj verkitaj per simpla Esperanto, kiujn oni sukcese povus uzi ĉe verkado de lernolibro. Por la tria grado, kompreneble, la eblecoj estas enormaj. Kompreneble mi ne antaŭvidas ĉi tie parnasismajn poemojn. Post tria grado lernanto estas nek poeto nek filologo (kaj neniam estiĝos, malgraŭ la celoj prezentitaj prologe de la lernolibro). Li devas scipovi nur libere legi romanon helpe de esperantlingva vortaro.

Ni atingas ĉi tie gravan problemon en la tria grado. Erara estas la celo mem de la kurso. Troas la supergramatikeco. Nek indas, nek atingeblas tio alia prezentita antaŭparole: krei tradukistojn el triagradanoj. Tio estas tasko de superaj (tute fakaj) kursoj.

Gravega fuŝo en la tekstoj estas ilia esenca, foje ĝisosta, bulgareco: la sensenca martelado pri Bulgarujo, la bulgara historio kaj la bulgaraj verkoj. Oni lernas fremdan lingvon por konatiĝi kun eksterlandaj kulturoj kaj moroj. Seninterese estas prezenti bulgaran aŭtoron aŭ paroli pri bulgaraj urboj. Ni prezentu ion pli allogan, novan, eĉ ekzotikan. La malo kreas artefartajn etosojn, kie la lernantoj (kaj la instruistoj) sentas sin malkonvene: paroli

fremdlingve pri hejmaĵoj! La klasĉambro fariĝas frida laboratorio, kie oni instruas listojn de vortoj kaj gramatikaj reguloj. Trafa elekto de teksto esence vigligas la tutan instruhoron. Tial mi elektas pikajn rakontojn kiel «Tre moderna fabelo» aŭ «Virina rideto pli kaptas ol reto». Ekzotika (kaj literature superlativa) teksto kiel «La lasta teŝeanco» senkonteste kaptas la lernantojn. Se poezion oni volas proponi, neniam prenu elegion, sed prefere malgrandan lingvoĵongladon de Raymoud Schwartz aŭ Reto Rosetti.

TRIE, la pezo de la gramatiko estas sence troigita. La celo de lingva lernolibro estas gŭste, ke la homoj komprenu kaj parolu tiun lingvon. Tute malproksimas de nia celo, ke ili nepre lernu la lingvoteorion. Estu specialaj kursoj por tiuj homoj, kiuj emas al tio. Eventuale eblas tion instrui entute nacilingve. Tute ne interesas al mi la teorio de la artikulizado, ĉar en mia denaska lingvo ekzistas artikolo, preskaŭ kia la Esperanta, kaj mi havas klaran senton, kiam uzi ĝin. Mi interesiĝas bone uzi ĝin. Estu markitaj nur la diferencoj inter Esperanto kaj la bulgara. Laŭeble induktive, ekz. sinjoro Tadeo, doktoro Zemenhof sed la rivero Danubo, la urbo Vraca, Balkano, Rila, Pirin, Kaŭkazo kaj Rodopoj, Alpoj, Pireneoj k.a.

Punktoj de la dua grado kiel: ...2. («en la dua kurso ni lernos la esperantan morfologion. Objekto de la morfologio estas...»), 3. («la substantivoj estas partoj de la parolo, kiuj...»), 4. («la demando **kiu**, uzita sola, rilatas...»)/, 5. («**kio** estas...»), 6. («la substantivoj havas du grandajn grupojn: komunajn nomojn kaj proprajn nomojn») aŭ 7. («la proprajn nomojn ni skribas per majusklo») estas absurdaj per si mem, aŭ ili komplete klaras post la unua grado.

La gramatikaj terminoj ne estas taŭge prezentitaj. Oni listigas amasojn da vortoj kaj konstruoj anstataŭ klarigi ilin. La listigado de la «cirkonstancaj komplementoj» laŭ la semantiko en la lernolibro de tria grado estas komplete malnoviĝinta kaj sen-senca. Aŭ en la dua grado, la diferencigo inter diversspecaj komunaj nomoj: kiucele? Tio ne estas efika.

Krome, foje troviĝas eraroj, kiel pri la uzado de la artikoloj.

Cetere, kiam oni uzas tiun lingvaĵon, laŭeble ĝi estu laŭ PAG aŭ aliaj internacie akceptitaj verkoj, kaj ne simpla traduko de la bulgara gramatiko.

KVARE, en la lernolibroj preskaŭ entute mankas ekzercoj. Oni devas aldonegi eĉ multajn pli ol tiujn, kiujn oni povas solvi dum la normalaj klashoroj, ĉar trejnado neniam troas, sed ofte mankas. Multaj kaj plej diversformaj ekzercoj estas entute konvena kaj necesa afero. Tio estas la bazo de lernolibro.

La ekzercoj devas esti variaj, kiel ekzemple en «Paŝoj al plena posedo», por ke la lernantoj ne aŭtomatigu la ekzercon, sed la konstruon. Grava eco estu praktikita diverse. Tio igas la kurson malmonotona, eĉ interesa.

KVINE, estas la manko de multimedia materialo. Laŭeble devus esti eldonitaj bendoj, kie oni laŭtlegas la tekstojn, prezentas ekzercojn, kantojn. Ni ne parolu pri filma aŭ gramofona materialo, sed ankaŭ estas helpmaterialo, kiun uzas aliaj metodoj, kiel desegnitaj bendoj, ŝkeĉaroj, laŭŝtupaj tekstoj, bildvortaroj ktp. Inter tiu helpa materialo ĉefas la vortaroj. Neniu plibonigo okazos inter la bulgaraj lernantoj, se ili ne havas bulgaran-esperantan kaj esperantan-bulgaran vortaron ekde la dua grado, kaj Plenan Vortaron de Esperanto almenaŭ ekde la tria. Tiuj vortaroj senkondiĉe devas eldoniĝi aŭ aĉetebli tuj.

Principa demando estas kial ne rekte uzi «Paŝoj al plena posedo» por tria grado. Mi tre alte taksas tiun verkon, kaj ĝi entute ne devus esti malfacila por homo jam lerninta Esperanton du jarojn. Mi konsentas, ke indas kompletigi ĝin por bulgaroj, sed tio estas multe pli facila afero ol verki kompletan lernolibron.

FINE oni devas bone studi la sperton, i. a. de la Zagreba Metodo, ĉar ĝi estas verkita por kroatoj, sufiĉe simillingvaj al la bulgaroj, kaj jam havas konstatindan sukceson plurlande.

Hektor ALOS I FONT,
Kjustendil

EMOCIA FESTO

En sia Kulturdomo, la esperantistoj el Plovdiv kaj iliaj gastoj celebris la 24-an de majo — feston de la slava skribo kaj kulturo omaĝe al la faro de fratoj Kiril kaj Metodij.

La festa programo, estis prezentita de membroj de Arta Klubo—84. La ĉeestintoj aŭdis interesan prelegon de Atanas Krumov pri la rolo de la fratoj kaj pri la simileco de du kulturaj eventoj en la homa historio — la kreado de slava alfabeto, kaj en la moderna mondo, la disvastigado de internacia lingvo Esperanto.

La amatora vokala grupo, gvidata de dirino Stefka Stamatova, plenumis ŝatatajn kantojn en bulgara lingvo kaj en Esperanto. Unue, kompreneble, ĉiuj entuziasme kantis la himnon de Kiril kaj Metodij «Antaŭen, al estonto hela».

Partoprenantoj en la literatura grupe ĉe Arta Klubo recitis aŭ tralegis interesajn originalajn kaj tradukitajn verkojn. La unuaj prezentis siajn verkojn niaj karaj veteranoj — Anka Peĥlivanova kaj Ĥristo Dodov. En la programo partoprenis ankaŭ junaj homoj.

Inter la gastoj estis itala esperantisto, amiko de nia societo, sinjoro Gabriele Solitari, kiu por la dua fojo vizitas nian urbon kaj nian klubejon.

Post la programo la sekretariino de Arta Klubo, Elena Ĥristodulova, gratulis ĉiujn instruistojn kaj kulturajn agantojn, donacante al ili rozojn kaj salutkartojn okaze de la plej bela festo de nia popolo. La prezidanto de la urba societo «Kulturo», Nikolaj Bojaĝiev, ankaŭ gratulis la instruistojn kaj ĉiujn ĉeestantojn kaj dankis la artklubanojn pro la festa programo. Ĉiuj reciproke salutis unu la alian sincere, amike. Ili certe gardos la memoron pri la emociaj minutoj, travivitaj en la Kulturdomo de esperantistoj, en la antaŭverspero de nia plej kara festo.

Liliĵa SOTIROVA

BUNTA EKSPOZICIO DE PUPOJ KAJ BILDKARTOJ

Okaze de la 1-a junio — Tago de la Infano, en la Nacia Muzeo de Klerigo en Gabrovo estis aranĝita ekspozicio de esperantistino Elena Kovaĉeva kaj ŝia filo, pentristo esperantisto Boĵidar Kovaĉev.

La vicedirektoro de la muzeo Anĉo Anĉev malfermis la ekspozicion kaj salutis la E-veteraninon. Elena Kovaĉeva estas instruistino pensiulino, kiu komencis lerni Esperanton en 1923. Ŝiaj gekorespondantoj estas el 50 landoj el ĉiuj kontinentoj. 20 jarojn ŝi estas individua membro de UEA.

En la muzeo unuafoje oni montras preskaŭ ĉiujn kolektojn de E. Kovaĉeva. En la salono oni povas aŭdi la voĉon de birdo «kokabara» el Aŭstralio, kiu ridas kiel homo kaj eligas sonojn de la eksterordinata birdo «lira», kiu imitas ĉiujn birdojn en la ĝangalo. Ankaŭ sonas kantoj de la aŭstraliaj aborigenoj, monotonaj kantoj de gentoj el Centra Afriko, japanaj kantoj.

La pupkolekto de E. Kovaĉeva konsistas el ĉirkaŭ 200 pupoj en naicaj kostumoj el tuta mondo. Ĉi tie, en la salono estas montritaj 89 pupoj. Atenton altiras la granda pupo el Italio kvazaŭ princino. Apud ĝi troviĝas la bonodora pupo el Brazilo, farita el la radikoj de santala arbo. Interesaj estas la pupoj el Mozambiko kaj Brazilo vestitaj en diverskoloraj vitroperloj. Nekutimaj estas la lignaj pupoj el Kongolo, Japanio kaj Suda Afriko. Ĉarmaj estas la «tajvaninoj», belegaj estas ĉiuj pupoj. Estas malfacile diri kiu popolkostumo estas pli bela, ĉar ĉiu: nacia kostumo portas sian specifan belecon.

La vizitantoj povas vidi parton el la kolekto de bildkartoj el tuta mondo. Iuj el ili en Hispanio estas broditaj, aliaj estas stereobildkartoj. Bela estas la mondo, interesa estas la arkitekturo en diversaj landoj. Sub vitro estas montritaj bele ornamitaj leteroj, kovertoj, japanaj albumoj kaj brazilaj ventumiloj, E-libroj.

Sur la muroj oni povis vidi grafikan ekspozicion-bazon de B. Kovaĉev, kiu konsistas el 21 grafikaĵoj, realigitaj en diversaj teknikoj — linogravuraĵo, akvaforto, akvatinto, kaj miksa tekniko. Estas menciinde, ke kelkaj el ili prezentas parton el la pupkolekto de lia patrino.

Sonja TIHOVA

TIEL — KIEL, KIEL — TIEL

La frazoj, en kiuj estas du propozicioj ligitaj per **tiel-kiel** (aŭ **kiel-tiel**) entenas ĝenerale ideon de komparo inter du elementoj: oni komparas ion, kio ne estas konata aŭ estas ne sufiĉe klara, kun alio kion oni konas. Do, estas du terminoj: komparaĵo kaj bazo de komparo.

De kelka tempo ni observas ĉe iuj samideanoj konstantan praktikon meti nepre la terminon, enhavantan la komparaĵon (**tiel**), en la unuan lokon, kaj en la duan lokon la terminon, kiu enhavas la komparbazon (**kiel**).

Tiu ĉi praktiko verŝajne estas ŝuldata al influo de iu nacilingva uzo, aŭ eble al imita uzo de iu esperanta verkisto, sed laŭ mia opinio la pedanta sekvado de **tiel-kiel** anstataŭ **kiel-tiel** en similaj frazkonstruoj ne povas trovi pravigon kaj apogon sur la logiko.

Ne nur per **tiel-kiel** estas esprimata komparo, sed ankaŭ per la ceteraj vortetoj de la korelativa tabelo: **kia-tia**, **kie-tie**, **kiom-tiom** ktp. Ni certe memoras la proverbon: **kia** patrino — **tia** filino. Kion ni esprimas per ĝi? — Ni konas la patrinon kaj ni deziras aserti, ke la samajn kvalitojn kiel ŝi havas ankaŭ la filino. Ĉu estus pli logike konstrui la esprimon jenmaniere: «Tia filino — kia patrino?»

En similaj okazoj oni sentas, ke estas pli logike meti unue la komparbazon kaj poste la komparaĵon. Kaj jen ekzemplo pri konstruo kun **kiel-tiel**: «En la Universitato oni malfermis kurson de Esperanto por stu-

dentoj, tamen krom studentoj ĝin vizitas ankaŭ kelkaj laboristoj». Kiel ni esprimus tiun ĉi staton?

La kurso estas vizitata kiel de studentoj, tiel (ankaŭ) de laboristoj.

La normala, la regula stato estas la vizitado fare de studentoj — ja por ili estas malfermita la kurso. La vizitado fare de laboristoj estas nur escepto preter la regula stato. Certe ne estus tre logike konstrui la frazon jene: **La kurso estas vizitata tiel de laboristoj, kiel de studentoj.**

Pro la elmetaj konsideroj mi ne trovas tre trafe aranĝitaj la sekvantaj frazoj kiujn mi ĵus legis en unu tradukaĵo:

«La individuaj artistoj ne postrestis en la nobla konkurado **tiel** ĉe konkursoj, **kiel ankaŭ** sur la koncertaj estradoj».

«La Sofia Filharmonio kontentigas la plej pretendemajn aŭskultantojn **tiel** per sia teknika prepariteco, **kiel ankaŭ** per la denseco kaj la varmo de la tonoj».

El la supraj notoj oni tamen ne eltiru regulon, ke nepre ĉiam devas esti sekvata **kiel-tiel** kaj ne **tiel-kiel**. Restas naturaj kaj bonaj la esprimoj de la tipo: «Li estas **tiel** alta **kiel** ŝi».

Notu ankaŭ, ke en la ĵus montritaj ekzemploj ni povas ĉiam uzi **ne nur... sed ankaŭ**, aŭ simple ligi la du terminojn per la adverbo **egale**.


Atanas D. ATANASOV — ADA
El «La lingva esenco de Esperanto»
UEA, 1983

ANONCETO

E-Kulturdomo kaj E-societo «D-ro L. L. Zamenhof» — Razgrad, aranĝas letervesperon en novembro k. j.

Estas bonvenaj bele afrankitaj leteroj, BK, esperantaĵoj ktp. por interesigo de niaj novaj esperantistoj.

Estos lotumitaj du premioj por la plej intereskapaj leteroj aŭ BK. La gajnintoj gastos du-tri tagojn senpage en Razgrad. Krome ĉiu sendinto ricevos suvenirojn de nia urbo. Adreso: E-Kulturdomo, 7200 Razgrad, ul. «G. Dimitrov», EK 3, Bulgario.



Distroj

LA PREMIO

Ĉi-foje estas premiata nia regula legantino Cveta Popova el Pernik. Ŝi ricevas la E-libron «De bordo al bordo» de Elisaveta Bagjana.

En nian redakcion plu alvenas interesaj leteroj. C. A. Shrives el Britio, premiita pro ĝusta solvo de enigmo el n-ro 3/1990 de «BE», konfirmis la bonan alvenon de la libropremio: «... Kia agrabla surprizo! Elkore mi vin dankas. Post du vizitoj al via lando, mi daŭre korespondas kun geamikoj el urboj Gabrovo, Jambol, Nesebâr, Plovdiv, Sofio kaj Stara Zagora. Entute 8 personoj.

Mi intencas denove viziti vian landon, eble en 1991. Denove mi dankas vin.

Bonan sukceson al vi kaj via laboro... sincere via

C. A. Shrives

Fine jen la solvo de «Sablâ horloĝo», publikigita en n-ro 6/1990 de «BĖ»:

1. Madono. 2. Mondo. 3. Domo.
4. Odo. 5. Do. 6. O. 7. Lo. 8. Alo.
9. Salo. 10. Klaso. 11. Sekalo.

Solvu!

LA KONGRESO

Ŝumen. 42-a Kongreso de Bulgara Esperanto-Asocio. La unuan tagon posttagmeze parolis kvar samideanoj t. e. Bojan, Vasil, Jordan kaj Stefan. Ĉiu el ili venis el unu el la urboj Lom, Vârşec, Miĥajlovgrad kaj Berkovica.

Konsiderante la jenajn donitaĵojn vi devas diveni la ordon de la eldiroj de la esperantistoj kaj el kiu urbo estas ĉiu samideano.

— Nek Bojan, nek la esperantisto el Miĥajlovgrad parolis unua.

— La reprezentanto de urbo Lom kaj Vasil konatiĝis dum la 8-a sesio de ISEU en Veliko Târnovo.

— Jordan, kiu ne estas el Vârşec parolis post Vasil.

— La esperantistoj el Berkovica kaj Miĥajlovgrad loĝas en la sama hotelo, en kiu loĝas Jordan, sed en alia ĉambro.

— Stefan neniam vizitis urbon Vârşec, Vasil ankaŭ.

— Laste parolis la samideano el Miĥajlovgrad, sed lia nomo ne estas Vasil.



— Bojan ne konas la esperantistojn el Berkovica kaj Lom.

— La lom-ano invitis Stefan gastigi en lia societo «Sukceso».


Cvetan MANOJLOV.

Noto de la Redakcio:

Viajn solvojn sendu ĝis la 15 de novembro 1990. La rezultoj estos publikigitaj en n-ro 2/91 de «BE».



Ĉu vi estas bona observanto? Malkovru la diferencojn!



Deziras korespondi

ALĜERIO

DAHMANE BOUZIANE — B. P. 148 Drim, Premiere RM, Blida — kun ĉi pri sporto.

BELAHMAR LAKHDAN (35-jara) — 34 Rue des freres Mahmoud, Ammi Moussa, Relizane — kun ĉi pri sporto, kino, muziko, vojaĝoj.

BULGARIO

MARIELA BASARBOLIEVA (23-jara) 7000 Ruse, ul. «Dondukov Korsakov» 12, et. V. — kun ĉi pri ĉt.

ENĈO ENĈEV (21-jara laboristo) — 8840 Sliven, Sli-
venski mineralni bani, bl. 2. — kun ĉi pri historio,
geografia, religio kaj sporto.

IVAJLO KEĤAJOV (16-jara lernanto). — 5004 V. Târ-
novo, ul. «Rajna knjaĝina» 5, vñ. III, ap. 16 — kun ĉi
pri muziko, turismo, kosmo, informadiko, kol. bk., pm,
kalendaretojn.

ROSICA KANĈEVA (19-jara studentino) — 1126
Sofio, ul. «Minzuŝar» 6 — kun ĉi pri turismo, muziko,
arkitekturo.

ALEKSANDĀR PETROV (26-jara) — 1343 Sofio, ĵ.
k. «Ljulin», bl. 212, vñ. IV, ap. 67 — kun ĉi pri ĉt.

POLLANDO

EVA kaj ĈESLAVO PIETRASZEWSKY (28-jaraj
instruistino kaj oficisto) — PL-22-114 Zmudz, Leszc-
zany — kun ĉi pri vojaĝoj kaj Esperanto.

BARBARA MIESZCZAK (12-jara) — PL-57-540
Ładek-Zdroj, ul. Psirowskiego 23/3 — kolektas bk,
pm, glubildojn.

KAZIMIERZ MIRONOWICZ (18-jara) — PL-42-500
Bedzin, ul. Długa 59 — kun ĉi pri vojaĝoj, sporto kaj
literaturo.

JAREK WYROZEBSKI (23-jara studento) — PL-11-
400 Ketrzyn, ul. Wrocza 1/29 — kun ĉi pri turismo,
literaturo, biologio.

GRAZYNA BYCZKOWSKA (35-jara) — PL-60-480
Kierkrz-Pozan, ul. Podjazdowa 6 — kun ĉi pri turismo,

kol. bk.

ANNA MARUT (39-jara kuracistino) — PL-97-30
Piotrkow Tryb, ul. Wyzwolenia 2/4, bl. 12 m 57 kun
ĉi pri literaturo, diapozitivoj, suveniroj, turismo.

KAZIMIERZ KUJAWA (46-jara) — PL-97-300
Piotrkow Tryb, ul. Dabrowskiego 16 m 4 — kun ĉi pri
sporto, fotado, turismo, kol. pm.

JADWIGA BOCHNIAK (33-jara oficistino) — PL-26-
333 Paradyz woj. Piotrkow Tryb, ul. Piotrkowska
6 — kun ĉi pri literaturo.

RUMANIO

MARIANA GIRSTEA (24-jara laboristino) — str. Go-
raslau, bl. T16, ap. 22, 2400 Sibiu — kun ĉi pri ĉt.

DANIELA DORDEA (37-jara inĝenierino) — str. Rus-
ciorului, bl. 24, 2400 Sibiu — kun ĉi pri ĉt.

IULIANA ALDEA (15-jara) — Calea Dumbravii bl. 17,
ap. 44, 2400 Sibiu — kun ĉi pri ĉt.

ANAMARIA BISTRICEANU (15-jara) — Cv. Vasile
Aron, str. Steflesti bl. 9, ap. 16, 2400 Sibiu — kun ĉi
pri ĉt.

SOVETUNIO

EDUARD BYSTROV (16-jara) — SU-660025 Kras-
nojarsk, p. k. 1963 — kun ĉi pri muziko, sporto, histo-
rio k., a. temoj.

OLEG FRŬLOV (42-jara instruanto en muzika lerne-
jo) — SU-182100 Velikie Luki, Pskovskoj obl., ul.
Nekrasova, d. 19, kv. 31 — kun ĉi pri humanismo.

NATAŜA LEVIĈKAJA (9-jara lernantino) — SU-
310174, av. Pobeda 77-42 — kolektas bk, kalendare-
tojn, pm.

ALMA ŜLAMAITE (30-jara kuracistino). — Litovio,
Panevežys, Molainiu 20-62 — kun ĉi pri ĉt.

VJETNAMIO

NGUYỄN DŬ KHÁNH — Esperanto STK 19/3 Bui
Hũu Nghiã Q.5, HO CHI MINH V. N — dez. kor. kaj
volonte helpi E-turistojn.

FILATELO

*Komitato por Komunikado kaj Informado
en Bulgario emisiis la 15-an de junio 1990
specialan poŝtmarkon dediĉitan al 200 ja-
roj ekde naskiĝo de la fama franca verkis-
to — Alphonse de Lamartin, loĝinta kelkan
tempon en Bulgario.*

Valoro: 20 stotinkoj.

Formato: 25 × 35mm (horizontale)

Papero: gumita 100% celulozo.

Tekniko: ofseta presado.

Pentristo: Maglena Konstantinova.

*Presejo de la Bulgara filatelo kaj numiz-
matiko*

Eldonkvanto: 1 200 000 pecoj.

Draguŝko PETROV



Bulgara Esperantisto

● varia kaj intereskapta enhavo, riĉe ilustrita per bonkvalitaj fotoj kaj grafikaĵoj;

● aktualaj artikoloj kaj informoj pri bulgara kaj tutmonda E-movado;

● legindaj publikaĵoj en la rubrikoj: «Originala verkaro», «Esperantologio kaj Interlingvistiko», «Lingvaj demandoj» «Juna Esperantisto», «Verdaj steletoj» (porinfana), «Leteroj de korespondamiko», «Deziras korespondi», «Distra paĝo» k.a.



Legantoj en pli ol 50 landoj.

Jarabono: 32 gld. aŭ egalvaloro.

Abonebla ĉe la Libroservo de UEA, la naciaj poŝtoj kaj ĉe perantoj en multaj landoj.

Petu provekzempleron ĉe la Redakcio.

Adreso: Bulgara Esperantisto
P. K. 66
Sofio 1000
Bulgario

79B-14180

ISSN 02—04—8701

TECHNO **IMPORT EXPORT**

PROFITE POR VI

«TECHNOIMPORTEXPOR» povas helpi vin aĉeti
aŭ vendi.

«TECHNOIMPORTEXPOR» ofertas kunlaboron
rilate ĉiujn demandojn de la eksterekonomia aga-
do.

«TECHNOIMPORTEXPOR» realigas inĝenierin-
gajn servojn en- kaj eksterlande, importon kaj eks-
porton de kompleksaj objektoj kaj unuopaj maŝi-
noj por la malpeza kaj peza industrioj.

«TECHNOIMPORTEXPOR» efektivigas devizajn-
financajn operaciojn, invest-produktadan,
transport-speditoran kaj konsultan agadojn en la
sferoj de merkatesploro, administrado, ekonomio,
teknologioj, internacia juro, konstruado, komerco,
hotelmastrado, turismo kaj laboro en liberaj sen-
doganaj zonoj.



SOFIA/BULGARIO
TELEKSO: 22193, 23421
TELEFAKSO: 65 81 47